INTERNACIA MONDLITERATURO

PRUDENCI BERTRANA:

# BARBARAJ PROZAĴOJ

FERDINAND HIRT & SOHN
LEIPZIG
ESPERANTO-FAKO

LÖ

*Internacia*
*Mondliteraturo*
*Volumo 18*

# INTERNACIA MONDLITERATURO

Kolekto de la plej famaj verkoj
el ĉiuj naciaj literaturoj

FERDINAND HIRT & SOHN EN LEIPZIG / 1926
ESPERANTO-FAKO

PRUDENCI BERTRANA

# BARBARAJ PROZAĴOJ

El la kataluna originalo tradukis

Jaume Grau Casas

FERDINAND HIRT & SOHN EN LEIPZIG / 1926
ESPERANTO-FAKO

ĈIUJ RAJTOJ ESTAS REZERVATAJ
COPYRIGHT 1926 BY FERDINAND HIRT & SOHN
MADE IN GERMANY

Esper 1381 I

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA KUL

V - 11200

PRESEJO BREITKOPF & HÄRTEL, LEIPZIG

# TABELO DE ENHAVO

Paĝo

Antaŭparolo . . . . . . . . . 7

La forlasita vojo . . . . . . 9

La kabanoj de la karbfaristoj . . 28

La kamenoj de la gastejoj . . . 37

Josafat (Novelo). . . . . . . 46

(Fragmentoj el la ĉapitroj VI—VIII)

# ANTAŬPAROLO

Prudenci Bertrana estas unu el la plej fortaj prozistoj en kataluna lingvo. Li estas tute originala aŭtoro. Se la lingvo, en kiu li verkis, estus pli disvastigita, lia nomo estus internacie konata.

En siaj kelkaj libroj, li pritraktis diversajn temojn: sed lia plej karakteriza lerteco estas la pritrakto de „kamparaj“ temoj. Efektive li estis fervora ĉasisto kaj ekskursamanto, kaj li havis okazon profunde esplori la animon de plej humilaj kamparanoj.

Liaj du ĉefaj verkoj sendube estas: „Josafat“, novelo, kie estas priskribata la eksplodo de la perfortaj trudoj de la karno, kaj „Barbaraj prozaĵoj“, prozaĵoj nomitaj barbaraj pro ilia krudeca priskribo de la vivo disvolviĝanta en plena naturo.

Mi elektis por tiu ĉi volumo tri el la „Barbaraj prozaĵoj“, malgraŭ la granda malfacileco de traduko de multaj esprimoj kaj de kelkaj nomoj de animaloj kaj plantoj. En „La forlasita vojo“ la leganto povos admiri la fantazion kaj sugestian povon de la aŭtoro, sentante la timon naskatan de la kuniĝo de soleco kaj mistero; en „La kamenoj de la gastejoj“ oni vidos pentraĵon de la kamparana vivo en ĉiuj ĝiaj detaloj; en „La kabanoj de la karbfaristoj“ oni sentos la ĉarmon de vivado primi-

tiva kaj izoleca for de urboj kaj vilaĝoj; en ili ĉiuj oni ĝuos sentimentalan vibradon de simpatio kaj kompato, per kiu la aŭtoro ĉirkaŭas la prezentatajn figurojn; oni trovos delikatajn fajrerojn de ironio; oni konstatos mirigan observemon de spirito sincera kaj fervora.

---

La eminenta kataluna verkisto afable donis permeson por traduki en Esperanton liajn verkojn, pro kio la esperantistaro devas esti al li danka.

Mi esprimu ankaŭ dankon al S-ro Gustau Galceran el Vilanova i Geltrú, kiu bonvolis helpi min en la traduko de kelkaj vortoj.

Barcelona. *Jaume Grau Casas.*

# LA FORLASITA VOJO

## UNUA VIDO

El la malmultaj sentimpresoj de mia infaneco vivantaj en mia memoro, unu ekzistas, kiu konserviĝis mirinde freŝa, klara kaj preciza, triumfe flosanta super la fluo de la jaroj kaj super ĉiuj malkvietaj ondegoj de la vivo. Ho, kiel mi devis esti malgranda, tiam! Mi devis esti tre infana, ĉar la rememoro vivas izolita, sen ia rilato, sen iu postsigno rilatigebla al iu difinita aĝo. Ĝi estas kvazaŭ la unua eklumaĵo en la ĥaoso de mia ekzistado; pli bone dirite: la unua helblindiĝo de malgranda animo, kiu vekiĝas; la komenca admiro de okuloj antaŭpretigitaj al ekstazo.

Ni veturadis tra dezerta vojo sur ĉaro, kiu moviĝadis tre malrapide, inter arbaroj; mi havas ankoraŭ la malprecizan impreson de granda kvieto, de unutona knarbruo de la aksoj de la radoj, de unutona grincado de la radferaĵoj mordantaj la ŝtonpecojn, de unutona preterpaso de arbotrunkoj apude de la bariloj de la ĉaro ... Mi ĝuas ankoraŭ, kvazaŭ mi troviĝus en ĝi, la dolĉan malkvietecon de tiuj, kiuj forlasas unuafoje sian hejmon: miksiĝon de nostalgio kaj revo. Mi memoras, ke la tago estis griza, ke ni trapasis altan ebenaĵon kaj ke miaj okuloj, fiksitaj al la horizonto, rigardadis de antaŭ longe

ion por mi neklarigeblan. Post senfrukta terspaco, senarba, vastiĝanta kun nuancitaj brunecoj, etendiĝis en la malproksimo, senegale ondlinia, franĝo de duba blueco. Kio estis tiu franĝo? Ĝi ne povis esti teroj, ĉar tiuj teroj rezultus gluitaj al la ĉielo; ĝi ne povis esti akvoj, ĉar ili ne starus tiel altaj; ĝi ne povis esti nuboj, ĉar ili dismoviĝus. Kaj dum ĉio unuforme ruliĝis ĉirkaŭ la veturilo kaj preterpasadis grandaj arboj kurbigitaj, kun pasado de kaduka maljunulo, kaj la arbetaĵoj kaj pinoj forkuris malantaŭen, kaj la siluetoj de la altegaj arbaroj aliformiĝis iom post iom, tio restadis senŝanĝa, malproksima, mistera, vidiĝanta sur la sama nivelo de la garnituro de la jungita bruto, laŭlonge de la dorso, super la oreloj, kvazaŭ senfina franĝo pentrita de nesperta mano ĉe la horizonto.

Mi ne povis elteni plu . . .

— Kio estas tio, patro? —

Li ne respondis al mi tuj. Estis necese klarigi ĝin laŭ mia maniero kaj signi ĝin multfoje, por ke li certiĝu pri tio kion mi aludas. Tiam, ne rigardante min, tenante la bridojn kaj la vipon, distrite, li diris du vortojn:

— La montoj. —

Ho, kia revelacio! La montoj! Kia revelacio por mi, kiu, en mia nesperteco de urba infano, kredis ilin tiel sufokaj, tiel proksimaj, tiel plenaj de nefortikaj arboj kaj ŝtonpecoj, de vojetoj kaj kabanetoj! Ĉu oni povus atingi tiujn montojn? Kio estus tie? Kial ili vidiĝis tiel glataj? Ĉu estis bluaj la rokoj kaj la arboj kaj la domoj de tiuj montoj?

Mia patrino, kareseme, volis konigi ilin al mi unu

post unu. Ŝi etendadis la fingron kaj prononcadis nomon de sanktulo. La litanio glitadis tra mia malgranda mirigita cerbo. La montoj! Ili eble estus la limo de la tero! Kaj tie ĉi la brilo de tiu rememoraĵo estingiĝas.

Nur mi konservas, ankoraŭ, sensignifajn restaĵojn de konversacio inter miaj patro kaj patrino. Ili parolis pri rabistoj, menciis danĝerajn lokojn, historiajn faktojn de la antikveco, kiujn mi aŭskultadis kun iom da intereso, meze de ŝanceliĝoj kaj fraptuŝoj, kun la okuloj fiksaj, tamen, sur la franĝon dubebluan, senŝanĝan, kiu vidiĝadis super la garnituro de la ĉevalo, laŭlonge de la dorso, super la oreloj . . .

Kaj ne demandu al mi, kien ni iris resti tiun nokton, nek kiaj ĝojoj nek kiaj doloroj okazis al mi ĉe la fino de tiu vojaĝo, nek dum multaj tagoj poste, nek dum multaj monatoj, nek dum multaj jaroj . . .

## I

## LA VOJO

Certe, leganto, mi devus klarigi al vi kelkajn antaŭinformojn pri tiu vojo, kiun ni ambaŭ sekvos, se al vi plaĉas mia kuneco kaj mia konversacio; mi devus paroli almenaŭ pri ĝia graveco historia, strategia kaj komerca, kaj pri aliaj aferoj, kiuj ja devas troviĝi enregistritaj en libroj kaj dokumentoj. Nenion mi scias pri tio. Apenaŭ mi povas diri, ĉar mi tiel aŭdis, ke ĝi estis la malnova reĝa vojo de Barcelona al Francujo.

En mia infaneco mi trapasis sur ĝi. Tie devas esti, kie mi ekvidis unuafoje la verajn montojn, dum la tradicio, pere de miaj gepatroj, vekadis mian fantazion.

Depost tiam la forlasita vojo estis por mi vojo de ĉarmo kaj mistero. Ĝin sekvadi fervore en la kuneco de la plej fidela el la amikoj, la ĉashundo, kun peco da pano en la felpoŝo, iom da vino en la botelo kaj provizita la tabakujo, denove renkontante la lokojn kaj la aĵojn, kiujn miaj infanaj okuloj vidis vualitaj de terur-iga famo: jen la plej agrabla el la migradoj.

Malmultaj konas tiun faman vojon, kiu serpentiras tra dezertaj profundaĵoj, sekvante torentojn, trairante pinarojn kaj korkarbarojn, forviŝitan ĉe kelkaj pecoj, konservantan ankoraŭ aliloke majestajn larĝecojn, kiuj rememorigas pri ĝia malnova kondiĉo reĝa.

La majstra vojo, larĝe trabatita de Madrido al la Pire-neo, ĉe la aranĝo de la nova vojo restis meze de la arbaro kvazaŭ neutila kaj superflua aĵo, forlasita al la detrua agado de la jaroj kaj elementoj.

Antaŭ longe oni ankoraŭ iom trairis sur ĝi; sed, dum la kreado de novaj vojoj, ĝi laŭgrade komplete falis en neuzon.

Nuntempe en ĝi glitas nur la silento: fantazia silento elspirata de la apudaj arbaroj, kie la faroj de la ban-ditoj estas lasintaj vivantajn terurojn kaj ektimojn.

Malmultaj aferoj, tamen, pli indas esti konataj de la homo revema ol tiu tera franĝo pretervastiĝanta, for-manĝata de la pluvoj, premata de la cistaroj kaj erikaroj iom post iom invadantaj ĝin, kun ĝiaj gastejoj iĝintaj malriĉaj farmodomoj, kie eĉ ne akvon oni donus al vi, plensemita de postsignoj kaj restaĵoj de ĝia antikva brileco, forte interesaj.

La loko de mia prefero estas tiu de la Selva. Tie la kaduka reĝvojo alprenas aspekton de sovaĝa unu-

toneco efektive impona. Ĉielo kaj arboj; horon post horo vojirante duonkovrate inter densaj korkarbaroj; la trunkoj ĉiam kuniĝantaj en la horizonto; kaj la malgranda horizonto, malfermita kvazaŭ morditaĵo en la denso de la branĉaroj, konstante forkuranta de la vojiranto. Estas lokoj kie la apudaj korkarboj, kliniĝintaj kvazaŭ fantomoj al la libera spaco, formas timigan volbon de intensa mallumo. Kaj pli interne, en la flankoj, la vido perdiĝas en labirintan kruciĝon de trunkoj kaj branĉoj. La okuloj perceptas nur grizajn muskojn, kavojn grandegajn, senformaĵojn kaj tordiĝojn. Tio lacigas, estas teruriga kvazaŭ senfina preterpasado de kanceruloj kaj epilepsiuloj. Ekvidante vojkurbon aŭ komence de suprениro, la koro vastiĝas kun iluzio pri ŝanĝo. Neutile! La vojo forglitas glata kaj rekta en la densan arbaron. Dekstre kaj maldekstre estas la sama tero iom akcidenta; la erikaroj ĉiam vastiĝantaj en milda ondlinio sub la enigma duonlumo de la foliaro. La glateco de la ŝtonoza vojo kaj ĝiaj elfosaĵoj akvosulkitaj, la vojrandoj forviŝitaj kaj la fendiĝantaj sekaj kotoj, ĉio kaŭzas al vi tuj fortan impreson de soleco kaj forlaso. Tiam, farante vian vojiron, vi rigardadas teren; nek postsigno de vojiranto, nek radosulko, nek signo de hufoferaĵo ĉe la koto, nek piedsigno de hundo aŭ de persono ĉe la sablo. Oni ne komprenas, kiel tiu vojo, dum tiom da jaroj ne trairita de vivanta persono, konserviĝas mirige signita. Ŝajnas pluvivi en ĝi ia malbeno donita de la sennombraj plandoj de malbonuloj trairintaj sur tiuj ŝtonoj. La ideo ektimigas vin kaj ia neklarigebla sento pri minaco frostigas vian dorson.

Vi pensas, ke en tiaj solecoj, iu ajn persono povus esti rabata, mortigata kaj dispecigata sen ies observado pri tio, kaj ke la plej laŭta voko pri helpo perdiĝus en la malplenon.

La bruo de viaj propraj paŝoj igas vin turni la kapon, ĉar vi kredas, ke iu proksimiĝas malantaŭe.

Mi, tion mi malkaŝas, ne povis vojiri sur ĝi kvin minutojn sinsekvajn ne turniĝante. Ĝi ne estis vera timo kio igis min turniĝi; la inteligento rifuzadis ĉian eblecon esti atakata, — malmulte prosperus ĉiuj rabistoj se ĉiuj vojoj estus kiel tiu kaj ĉiuj vojirantoj kiel mi; — sed, neeviteble, io absurda kaj alarma ekregis min. Eĉ mia hundo, dudek paŝojn antaŭ mi, kutimis flari la kreskaĵaron kun duona suspekto. Ĝi ankaŭ perceptis la timigan elradiadon, kiu flosas kvazaŭ nubo laŭlonge de la vojo kaj kiu igas minaca eĉ la helan sunlumon superverŝantan ĉiujn aferojn.

Kaj la sangokoloraj argiloj; la glitfalintaj bordoj kun grandegaj terbuloj enretiĝintaj ĉe la interplektitaj arbradikoj; la ŝtonoj lokitaj en la deklivo de la elfosaĵoj, pretaj ekfali pro la subkavado de la akvo, kaj aliaj jam falintaj, meze de la vojo; ĉio ĉi, kion vi renkontadas, kiel la malbelaj lentiskoj, kiel la korkarboj fulmomortigitaj kaj la branĉoj deŝiritaj de la vento, ĉio ŝajnas al vi taŭga por dekoracii iun tragikan epizodon. Sed la plej korprema afero por la vojiranto estas tio, ke tiuj teruraj montraĵoj pri detruo reaperadas laŭ interspacoj en simila aspekto. Ŝajnas, ke vi ree trairas la samajn lokojn, kvazaŭ vi estus sub la influo de ia subtile malbonfara sorĉo, metanta denove sub viajn piedojn la

iritan vojon, por fari ĝin senfina kaj kondamni vin eterne vagadi sur ĝi.

Iom post iom via animo laciĝas de tioma unutoneco. Vi dezirus aŭdi iun bruegon de rado, iun klakon de vipo, iun sonoron de ĉevaltintiloj, iun kriegadon de ĉaristo kiel en aliaj vojoj. Eĉ la bestoj apartiĝas de tiu: nur de tempo al tempo iu bluparuo flugas super branĉeto persekutante insekton, iu garolo mallerte flugante trapasas la horizonton tra la klartruo de la branĉaroj, iu lacerto agitas la falintan foliaron, kaj brunflugila papilio haltas sur trunko.

Renkonti homon estas io hazarda kaj malkvietiga. Renkonti homon ŝajnas la afero plej simpla kaj natura kiu povas okazi sur iu vojo; sed ne tie, miaj amikoj. La trairantoj de la mortinta vojo estas imponaj kiel spektroj, eliĝas neatendite, venas el la arbaro kaj unuavide vi dirus ke ili estas unu el la tiomaj trunkoj, kiu ekmoviĝas kaj rekte venas al vi.

Ĉu vi ne renkontiĝis iam kun unu el tiaj homoj, kiu aperas al vi subite, ne vidite de vi, kvazaŭ elŝprucita de la tero, al kiu la adaptiĝo de la medio donas terurigan aspekton; fantomoj el argilo, kalko aŭ granito, kiuj sin movas pezaj kaj malgajaj, kiuj strabe rigardas, kiuj deflankiĝas de viaj paŝoj kaj malaperas sammaniere kiel ili venis? Tiuj de la forlasita vojo estas tiaj: ŝajnas ke vi surprizis ilin en malbona faro; oni ne povas diri ke ili estas vojirantoj nek terlaboristoj; nek vi komprenas kia estas ilia metio; ili havas iom da spiono kaj da vagulo; ilia vesto estas bruna kiel la ruskplanto, la haroj grizaj kiel la musko, la vizaĝo ruĝa kiel la tero de la

glitfalintaj vojbordoj, kaj ili portas sakon sur ŝultro; sako ja ne bonaspekta kiel tiu de la simplaj almozuloj, kies plenecon aŭ malplenecon vi dezirus scivole rigardi, kun la certeco trovi en ĝi ian ajn timigan aferon.

Vi ja ne interŝanĝus kun ili tiun saluton sinceran kaj spontanan, esprimon de solidareco kaj kamaradeco, kiun kutimas doni al si reciproke la vojirantoj, kiuj trairas la samajn terojn. Kvazaŭ sur tiu morta vojo trairus nur la personoj forpelitaj kaj malbonmoraj, tiuj ne povantaj trairi aliajn vojojn, iu neevitebla suspektemo igas vin turni la rigardon, kaŝe observante la sintenon de la nekonata trairanto, kiu malproksimiĝas ĉe via malantaŭo sammaniere malkonfida.

Kaj vane estus, se vi klopodus kontraŭstari la sugestion, kiun produktas tiuj lokoj; via animo divenas la postsignon de malkvietoj, de doloroj, de teruroj, kiun tie lasis aliaj animoj; vi partoprenas senvole la timojn, la svenojn, la profundajn melankoliojn, kiujn devis naski tiuj senfinaj vojaĝoj, dum kiuj la knabinoj riskadis la virgecon, la riĉuloj la poŝon kaj la malriĉuloj la vivon.

Ĉefe dum vintro, kiam la pluva vento siblas tra la terfosaĵoj ĉifante arbojn kaj kreskaĵojn, kaj la lumo de la plumba ĉielo kovras per sama morttuko proksimaĵojn kaj malproksimaĵojn, tiam vi dirus ke tra la krutaĵoj de la arbaro iu ĝemas: iu doloranta spirito, kaŝita de antaŭ cent jaroj; iu netrovita viktimo, kiun oni ĵetis tien, de kiu vi kolektus la ostojn, se ne mankus al vi la humoro esplori la nepenetreblan kreskaĵaron.

Certe ne devas manki homaj ostaroj en la neesploritaj anguloj de tiu regiono.

Estas facile havi la konvinkon pri tio, memorante nur, ke tiu vojo estis trairita de la homoj plej ambiciaj, de la armeoj plej potencaj, de la aventuristoj plej harditaj, de la generaloj plej kruelaj kaj de la krimuloj plej timindaj, kiuj konvulsiigis nian landon komence de la lasta jarcento.

Ho! sidiĝu iomete ĉe la rando de la vojo, kaj ĝi, en la plena silento vin ĉirkaŭanta, en tiu malvigleco, kiun la laciĝo donas al vi, dum vi ĝuadas la bongustan tabakon de l' mallongaj ripozoj, sentigos al vi ian specon de revo. Tiam la malnova internacia arterio ree iĝas viva kaj movoplena en kompleta reviglîĝo; ĝi pleniĝas de bruegoj kaj nubaroj de polvo; en ĝi kantas la soldataro; sur ĝi rulas strangaj veturiloj eskortataj per rajdantoj; kuras silente la forkurantoj; glitadas kun zorgemo aroj da armitaj homoj; vojiras kun pieda doloro la malliberuloj, kun malagrablo la ekzilitoj; sur ĝi rapidas veturilo ĉe kies pordetoj vidiĝas pala vizaĝo de maltrankvila sinjorino, samtempe kiam ĉe la vojrando trenadas sin teruraj figuroj de almozuloj kaj vagabondoj realaj aŭ ŝajnaj.

Ĉiuj historiaj personoj kun sia muzea vestaro, kun siaj sekvantaroj kaj pakaĵaroj; herooj, princoj kaj nobeloj, ambasadoroj, altrangaj sinjorinoj kaj tiamaj aventuremuloj, ĉiuj preterpasadas unu post alia kontraŭ vi; ĉiuj portas skribita, videbla, en la teniĝo kaj en la mieno, la dramon de sia vivo; ĉiuj marŝas ĉirkaŭataj de la aĵoj kaj personoj, kiuj al ili estis familiaraj; ĉiuj perdiĝas el vido tiaj, kiaj la antikvaj gravuraĵoj aŭ la trafaj biografioj prezentis ilin al ni.

La lasta silueto estas malaperinta. Vi daŭrigas la

vojiron pli vigle, pensante, ke la rigardoj de tuta tiu aro, tiel senlime variecaj, de la plej sentrankvile malkuraĝa ĝis tiu plena de fiera maltimo, ĉiuj sin turnis al tiuj trunkoj, sekvis la longecon de la vojo, esploris suspekteme la mallumecon de tiuj kreskaĵoj kaj laciĝis pro la senkompata unutono de tiuj solecoj; kaj ĉio de vi renkontata, ĉio kion ne povis forporti la pluvoj de tiomaj aŭtunoj, nek kuntreni la ventoj de tiomaj vintroj, nek vaporigi la sunvarmoj de tiomaj someroj depost tiam falintaj sur la vojon, ĉio aperadas al vi respektinda kaj brilfama, plena de tiu poezio de la pasinteco, de tiu nevidebla sigelo, kiu igas noblaj kaj respektindaj la plej vulgarajn aferojn.

## II.
## LA RIFUĜEJOJ DE LA ESKADRO-ĜENDARMOJ

Ni daŭrigu nian vojiron tra la forlasita vojo. Ankoraŭ estas io inda je via atento, tre karakteriza, forte interesa, kio malrapidigus vian paŝadon, pro deziro rigardadi ĝin, ĝis plena haltigo, se vi estus nur iom inklina al la detalaj observadoj.

Kiam pli vi vin sentas en izoleco, kiam pli la aspekto de la pejzaĝo donas al vi la impreson, ke vi longe ne vidos ion memorigantan pri homo, tiam vi perceptas ion klariĝantan ĉe la mallumeco de la korkarboj. Vi komprenas, ke ĝi estas iu malnova kaj malpuriĝinta muro de malgranda konstruaĵo neloĝata, ĉar ĉirkaŭe ne gratbruas kortbirdaro, nek bojas hundoj, nek vidiĝas pajlejoj nek alkondukanta vojo, nek interne resonas la plej sensignifa vivobruo.

Neniom agrable estas, ja, renkonti konstruaĵon mortintan apud mortinta vojo; sed ĝi pli ankoraŭ senkuraĝigas vin, kiam vi rigardas ĝin de proksime kaj kun atento. Ĝi estas dometo starigita je kelkaj metroj de la vojo, kaŝita en la arbaro, malgrandeta kaj kvadrata kiel ludkubo, kun embrazuroj ĉe la kvar flankoj kaj malgranda pordo kurbigita de la malsekeco, kiu malbone fermiĝas, lasante eliĝi la internan mallumon. Kreskaĵaro ĉirkaŭas ĝin, la sojlo fendiĝas, la mura kalktavolo krevas kaj tra ĝiaj fendoj ŝprucas la ruĝa polvo de la brikoj moligitaj de la frosto. Musko verdadas sur la tegmento kaj sur la muroj, tra kiuj gutas samtempe la nigra suko de la putraj lignotraboj de la plafono.

La dometo havas la tutan karakteron malfortan, nesufiĉan kaj nedaŭran de tiu arkitekturo de municio, improvizita kaj kruela, uzata por ŝirmi obeemajn subulojn, elmetante ilin al la danĝero de la malamiko, kiu regas ilin post mallonga rezisto. Ĝi ŝajnas eksprese farita por suferi en ĝi maldormon, malsaton, malvarmon kaj malĝojon, aŭ fali en kaptitecon, aŭ morti subpremate. Tie en la antikveco rifuĝis la eskadro-ĝendarmoj. La vojo estas plena de tiaj dometoj kaj ili konfirmas ĝian malbonan famon.

El tiuj embrazuroj oni observadis la rabistojn, kaj ankoraŭ en la malluma linio ŝajnas vidiĝi malprecize la viglanta fikseco de okuloj pli timoplenaj ol kuraĝaj.

Ho! provu, imagi la maldormojn, la terurojn, la nervkuntiriĝojn de tiuj tri aŭ kvar viroj enfermitaj en tia interno, la malkvietan premadon de la armiloj, malkonfidante je la solideco de muroj kaj pordoj, dum la longaj



BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA KUL

vintraj noktoj, ĉe la hurlado de la lupoj kaj la muĝado de la vento, sen fajro kaj sen lumo, izolite en la arbarego, for de ĉia helpo kaj de ĉia kompato!

Mi certigas al vi, kara leganto, ke, antaŭ tiu malgranda fortikaĵo fermita kaj malluma, vi sentus amason da nekutimaj scivolemoj; vi ja dezirus eniri en ĝin kaj esplori la postsignojn lasitajn de la lasta paro de ĝendarmoj, kiu tranoktis tie, flarsenti la aermankon de la pajla kuŝejo, legi la surskribojn kaj deĉifri la hieroglifojn desegnitajn per malbona krajono aŭ per la pinto de la bajoneto sur la glata muro, kaj tiel havi malproksiman konon pri la pensoj, pri la blasfemoj, pri la aŭguroj kaj deziroj, kiuj saturis tiun medion, kaj tiel rekonstrui la horojn de malespero tie travivitajn de tiuj kompatindaj sklavoj de sia devo, kies vivoj, sensignifaj kaj vulgaraj kiaj ili eble estis, nun profunde interesas vin.

Per simpla premado per fingroj vi povus faligi tiun putran lignaĉon taŭgantan kiel pordo, per sola piedbato vi fendus la brikajn murojn konsumitajn de la vetero; vi estas solaj, neniu vidas vin, la deziro realigi tion estas forta, truda, sed . . . ne estas danĝero! Skrupule vi timus, ke la mallumaĵoj vidiĝantaj tra fendoj kaj truoj, amasiĝintaj tie dum tiomaj jaroj, elkraĉiĝante eksteren malklarigus la tagan lumon.

Tial estas klarigebla la stranga respekto, kiun trudas tiuj malgrandaj konstruaĵoj de la ŝtato; ja, malgraŭ la forpasinta tempo kaj la trapasintaj malkvietuloj, ili restas netuŝitaj tiel, kiel lasis ilin la mano de tiu, kiu fermis ilin la lastan fojon.

Kaj vi de ili malproksimiĝas longe memorante ilin;

vi pensas pri ilia renkontiĝo, kiel vi pensus pri ektrovo de mistera skatoleto, ĉe kiu instinkte vi divenus, ke ĝi gardas la mallumon de la plej nigraj noktoj de cent vintroj, la prujnon frostigantan la koron de la aventuristoj kutimiĝintaj al la senkompato kaj al la venĝo, kaj la terurojn plej superstiĉajn de tiuj, kiuj flaris la sangon kaj ĝin igis flui.

III.

## LA KRUCO „DE LA MANO“

Pli ol la rifuĝejoj de la eskadro-ĝendarmoj, pli ol la gastejoj silentaj kaj malgajaj, pli ol la viroj-aperaĵoj de la mortinta vojo, impresus vin la vido de tiu kruco, kies sola kromnomo sugestas ion eksterordinaran, meritantan kelkajn vortojn.

Nun, leganto, kiam vi jam havas gravurita en via cerbo — se mia lerteco de rakontanto estis tia, kia mi ĝin deziris — la neĝojan aspekton de la mortinta vojo, mi volas paroli al vi pri tiu kruco.

Nuntempe, la kruco ne ekzistas. Se vi demandas pri ĝi la paŝtistojn kaj la ĉaristojn, ili gvidos vin al iu loko kaj kredos sincere — jen kio estas bedaŭrinda — ke ili montris kion vi serĉas.

Preter la gastejo de la „Paquenya“, proksime de la nova vojo, ĉe la flanko de Vilovi, meze de korkarbaroj kaj erikaroj, vi renkontos ŝtonozan ebenaĵon vastan kaj glatan, kie la mirakla konserviĝo de la vojo estas pli kompleta ol en ĉiu alia loko. Vere oni povas diri, ke tie estas la koro de la „Selva“; tie komenciĝas la dezerta regiono, tiu, tia sinsekvo de arbaroj, ĉe kiuj nur

de tempo al tempo vi aŭdas la bojon de iu hundo, la tintilon de iu brutaro, la laŭtan voĉtonon de iu koleriĝinta paŝtistino, kaj vi ekvidas en malproksimeco la pajlejojn de farmodomo aŭ malnovan tegmenton ruĝan meze de la bronzita verdeco de la gigantaj korkarboj.

Tie, en la antikveco, la vojo ekiĝis danĝera por la vojiranto; de tiu loko ĝis post multaj mejloj for, ĝi estis plena de bandoj de rabistoj harditaj kaj kruelaj, kiuj sekvestris, rabis kaj mortigis laŭplaĉe.

Tial tiu kruco, lokita tie por indiki la kuniĝon de la du vojoj, tiu, kiu sin direktas al la marbordo kaj tiu trairanta la monton, estis samtempe kvazaŭ tragika signo, post kiu la enirantoj en Hispanujon sentis flosi minacon en ĉiu vojkurbo kaj en ĉiu krutaĵo. Veturigistoj kaj ĉaristoj, ĉiuj konantoj de la nigra kroniko skribita per ponardbatoj kaj perfortigoj laŭlonge de ambaŭ vojoj, trairadis ilin kun konvulsia koro; se ili kantadis, tio estis por ne dubigi pri la kuraĝemeco de la praktikantoj de tiu metio, sed ilia voĉo ne estis tiel firma nek ludetema, kiel estis iom antaŭe, kiam la vento de la trankvila Empordana ebenaĵo plenblovis iliajn longajn kitelojn kaj zorgeme dispelis la polvon de la radoj.

Kaj, efektive, la Kruco „de la Mano“ ne havis ja aspekton tro trankviligan. Mi, havinta la sorton atingi ĝin staranta, mi povas priskribi kaj eĉ skizi ĝin.

Ĝi estis el forĝita fero, kun desegno nedelikata kaj primitiva, simple najlita ĉe la supro de masto glatigita per pikbatoj. Ĉe la brako signanta al Oriento estis mano kun la montra fingro etendita, ĉe la alia brako estis

litero M kun la kruroj tre disigitaj, kaj supre de ĉio estis la vera kruco, malgranda kiel tiuj, kiuj kronas la montrilojn de la ventdirekto ĉe la sonorilturoj.

Vidante ĝin, eĉ nur en desegno, oni komprenas kiel timige devis esti, en tiuj maltrankvilaj tempoj, vidi ĝin eliĝi, reliefiĝantan en la ĉielbluo, super la uleksaro, meze de la simetria perspektivo de la fantaziaspektaj branĉaroj.

Ĉiuj feraj krucoj renkontataj en la arbaroj eksentigas iom da timo: tiu, pli ol la aliaj. Ĝia nekutima komplikeco donis al ĝi ian skisman karakteron forte malkvietigan. Ĝi ŝajnis grafika esprimo de iu terura herezo; de ia rito severa, nekomprenebla; de iu timiga fatalismo, kruele primitiva, superreganta kaj nevenkebla kiel tiu, kiu devis tremigi la homon de la kavernoj. Tiu fingro rigida kaj nigra eterne signanta al la orienta horizonto, tra la ombra soleco de la Selva, sugestis la ideon pri tio neevitebla, pri tio kio estas skribita, kion vi ne evitus, kvankam vi malfarus la faritan vojiron, kvankam vi denove naskiĝus.

Ĝia kruda simbolismo estis komprenebla de ĉiuj; ne necesis esti tre lerta por sin orienti tuj per la helpo de tiu mano signanta al la nevidebla maro kaj de tiu malgracia M, malantaŭ kiu vidiĝadis la grandegaj siluetoj de la proksimaj montoj. Kun la spirito en ripozo, trankvila, tio igus rideti, sed tie, inter arbotrunkegoj, portante sur si la ĉagrenon de tiu, kiu vojiras sen alia kunulo ol sia ombro, saturite de la malbonfara sorĉo de la vojo dezerta kaj bandithava, oni donis ja alian interpreton al tiu simbolismo. Superstiĉe la vortoj *martiro, morto* al-

kuris elvokitaj de tiu kabalistika fero baranta la pason, de tiuj brakoj de la kruco traetenditaj tra la vojo avizante vin pri via trokuraĝeco, dirante, ke pli interne la mano de rabisto povus subite ungopremi vian kolon, elgrati viajn poŝojn aŭ forporti vin ligita en kavon por kripligi vin malrapide kaj sendi la pecojn, orelojn, nazon kaj langon, al via familio, se ĝi ne pagis tuj la postulitan monsumon.

Ha! kia loko de dubo devis esti tiu, por la vojaĝantoj, timigitaj kaj lacaj; tiuj vojaĝantoj, kiujn la malboninfluaj ventoj de pasintaj jarcentoj igis ruliĝi laŭlonge de tiu reĝa vojo, kvazaŭ arbofolioj.

Tuta la ĝenanta maltrankvileco, kiun oni sentis vojirante tra la monto, forkurante, malkonfidante pri la lando kaj pri la personoj, eble portante sur si la havaĵon savitan pro miraklo, devis multobliĝi ĉe la alveno al la teruriga kruco. Kiun el la du vojoj necesis elekti por havi la deziratan ripozon? En kiu el ambaŭ estis atendanta la bando de rabistoj aŭ krimuloj? La kompatinda aventurulo rigardas la krucon. Estas jam neeble vojiri ne deĉifrinte tiun signon de l' fatalo, kiu ŝajnas tie leviĝi ekspres por plifirmigi la dubon en la koro de la sendecidulo kaj senkuraĝigi pli la senkuraĝan. Kaj la fero muta, rustiĝinta, restadas senesprima, nedeĉifrebla; tiu speco de ventmontrilo ne deflankiĝas nek kliniĝas, nek turniĝas pro io en la mondo: nek antaŭ la larmoj de la vojirantoj al ekzilo, nek antaŭ la preĝantaj rigardoj de la erarintaj fremduloj, nek antaŭ la tremado de l'antaŭdestinitoj, de tiuj falontaj sen vivo post unu mejlo.

Same estus estinte, tamen; kiu ajn estis, el ambaŭ

vojoj, la elektita de la ŝancela vojaĝanto por aliri al la malproksima urbo, celo de liaj deziroj, lin atendadis la sama senfrukta spaco, la sama izoleco, la sama sinsekvo de arbaregoj kaj imponaj lokoj, kies nura ekvido nenion bonan promesis. Kiam oni estis fiksinta sur tiun krucon, kunigo de ĉiuj tragikaj signifoj de la ceteraj krucoj renkontataj laŭlonge de la vojoj, kelkaj el ili pie gravuritaj de la transportistoj per la pinto de la tranĉilo sur la viva roko, ne restis alia rimedo ol sin doni al la destino en korpo kaj animo. Necesis venki la danĝeran proksimecon de du gastejoj, tiu de la „Suro de la Palla“ ĉe la marborda vojo, tiu de „L' Arrupit“ ĉe la alia; du konataj nomoj, de terura famo, kiujn ankoraŭ diras la maljunuloj kun timigita tono.

Ne, ne estas eble trovi ie en la mondo monumenton pli superbele krudan kaj primitivan, pli bone esprimantan la kvanton da tio hazarda, neevitebla kaj neatendita ekzistanta en la senfina glateco de iu vojo, pli bone dirantan la fantazian poezion, kiu sekvas la vojiranton kaj la enigmon, kiu lin atendadas ĉe la vojaĝfino.

Leganto: se la Kruco de la Mano estus ankoraŭ staranta, mi vin petus ke, forlasante la enuigan unuformecon de la nuntempaj vojoj, kun ĝiaj amasigoj de ŝtonpecoj, kilometraj ŝtonoj kaj telegrafaj mastoj, vi iru pilgrimadi iomete, kiel mi mem, tra la forlasita vojo, kaj vizitu la priskribitan krucon, kun la fervoro kiun ĝi meritas. Mi rekomendus al vi, ke tio estu ĉe la vesperiĝo, kiam la ĉielo paliĝas malantaŭ ĝi kaj la vespertoj flirte flugadas en ĝia ĉirkaŭo, dum la noktuoj

flutkantas malgaje en la mallumiĝintaj profundaĵoj de la arbaro.

Estas neeble ke, vidata tiel, ĝi ne pezis sur la volojn, ne naskis dubojn, ne aliigis decidojn kaj ne malkvietigis la spiriton de tiuj, kiuj, per sia nura paso tra tiu loko, en tiu horo, jam efektivigis agon de alta graveco.

Neniu, neniu povas forigi de mi la penson, ke ĝi estas influinta sur la historion.

# LA KABANOJ DE LA KARBFARISTOJ

Se vi ilin vidus reproduktitaj sur iu ajn ilustrita revuo, apud tiuj dudek-etaĝaj domoj, fiereco de la modernaj urboj, mi certigas, ke vi trovus ilin komplete malŝatindaj. Imagu, ke ili ne havas *water-closets*, nek modernan kuirejon, nek lifton. Ili estas aranĝitaj sen planoj kaj sen arkitekto: tial ili estas tiel belaj. Ili konsistas nur el longa arbotrunko apogata ĉe unu ekstremo al la tero kaj ĉe la alia subtenata de la forkiĝo de du fortaj trunkoj, malfermiĝantaj en angulo por fiksiĝi sur la planko: ia speco de segista tabulo pli longa kaj pli krurdisigita, kun serio da ripoj el trunkoj, interplenigitaj per herbaĵoj, kovrita ĉio per kunpremita tero, poste per boskaj arbetaĵoj, por ke la pluvoj ne forportu la teron, kaj ankoraŭ per kelkaj branĉegoj supre, por ke la ventoj ne forportu la arbetaĵojn. Ĉe la triangula malfermaĵo de la fronto, muro el branĉetoj kaj densaj herbaĵoj; la pordo, en unu flanko, fermebla per fasĉino; kaj ĉio finita.

Ni interkonsentu, do, ke inter la simpleco de la grotoj primitivaj kaj la kabano de karbfaristo ekzistas esperiga progreso. Vero estas, ke dum la epoko de la mamuto, de la megaterio kaj de la grandaj saŭrioj, ili ne estus donintaj troan sekurecon al siaj loĝantoj. Sed nuntempe,

en la jarcento de la guberniestroj, de la ĝendarmoj kaj de la rajtigoj pri ĉasado, trairas nur ratoj tra la montaroj.

Malgraŭ ĉio, mi trovas tiujn kabanojn aparte plaĉaj. Mi ŝatas vidi ilin en la senarbigitaj montflankoj, serenaj meze de la malfeliĉo, inter amasoj da grizaj branĉoj kaj ŝeloj, nigraj ĉe la supro, kun fumanta marmito antaŭ ili, solecaj, maksimume kun haroriĉa hundo ilin gardanta, dum la mastro amasigas trunkopecojn pli malsupre, nevidebla en la profunda krutaĵo. Mi ankaŭ ŝatas renkonti ilin senatende, ĉe krutroko, en la rando de monto aŭ en la unutona ebenaĵo, disĵetantajn fumon sub nuboplena ĉielo.

Vidataj de proksime, ili ankoraŭ estas pli allogaj.

Vi ne povus eniri en ilin stare; sed tio ne gravas, ilia malgrandeco mem donas al ili ŝatindan ĉarmon, kaj la vojiranto konfide ripozus en ili, kiel alaŭdo apud timiana arbetaĵo aŭ pasero sub tegolo. Ili estas admirinde aranĝitaj: la simpla tegmento tiel proksima kaj varmeta, kaj tiu trabo, kiu ĉe la eniro devigas vin fleksi la korpon delikate, sen perforto, ĝis vi restas kuŝantaj sur la pajlo, havas iom da amika trudo, da insista invito malfacile rifuzebla.

Kiom da fojoj, trapasante antaŭ ilia pordo konfide malfermita, mi sentis fortan deziron peti gastigon en ili! Ili tiom odoras je seka foliaro kaj je hordea pano! Se vi vidus ilin! Nenio mankas tie. En la fundo, en la duonlumo, la vinbotelo; pli proksime, la kuŝejo: molaĵo el pajlo, kiu eliĝas el la trunkoj kuntenantaj ĝin, disiĝante tra la planko. Apud la muro el branĉetoj kaj herbaĵoj, estas la kameno, malgranda kameno, kie oni

devas bruligi fajreton kvazaŭ por ludo, ĉar ĝi havas la spirejon inter la ĉeftrabo kaj la forkiĝo de la du subtenantaj trunkoj, kiuj facile flamiĝus. Ankoraŭ en la angulo kontraŭa al la pordo, vidiĝas manĝaĵoj kaj diversaj iloj; amasigo senforma kaj stranga. Tie la terpomoj ruliĝas sur lankovrilo; la pato fulgplenigas la duonplenan saketon de la legomoj; la oleujo, ŝtopita per papero, kuŝas apud la paperkorno de la salo, kiu verŝiĝas; tranĉilo brilas sur la grasmakulita papero enhavanta rancan lardon. Kaj ankoraŭ, bone rigardante, supre aŭ malsupre, ĉe la trabo aŭ en kavo de iu trunkopeco, vi trovus kelkajn centimojn apud iom da nebona tabako kaj alumetojn. La bona karbfaristo ankaŭ sentas la poezion de la kaŝigo.

Nu, sincere, diru al mi: ĉu ĉio tio ĉi ne vekas en vi iun egoistan deziron izoliĝi, vivadi tie, pasigi tie almenaŭ unu nokton, sentante flosi super la tegmento el fasĉinoj kaj premita tero la solenan misteron de la malluma arbarego? Ili estas tiel intimaj, tiel kareseme malgrandetaj ĉi tiuj kabanoj de arbarloĝanto! Ĉion vi havus tiel je manatingo, vi sentus vin tiel akompanataj de la fajreto de branĉetoj, estus tiel bona la botelvino kaj tiel bongusta tiu bruna pano, vin ŝirmus tiel volonte tiu kovraĵo de mortaj branĉoj! Kaj poste, kiam kuŝante en la mallumo vi vidus fali al viaj piedoj, pasante tra la spirtruo taŭganta kiel kamentubo, la palan helecon de la steloj, kiom vi sentus la ĉarmon de tiu respekta kareso, de tiu intimeca kisado!

Ho, ne ridetu, ne faru ironiajn grimacojn. Mi tutkore kompatas tiujn, kiuj en infaneco ne sentis la voluptecon

sin kaŝi en anguleton; tiujn, kiuj en la gajaj matenoj de la dimanĉoj, ludante sur la lito, ne kovris sian kapon per la littuko por vidi transiĝi tra ĝi la mildan lumon; tiujn, kiuj, sub pluvombrelo en Aprilo, pasis indiferente, ne haltante por aŭdi la molan gutadon de la florintaj branĉoj; tiujn, kiuj en la malvarmaj vintraj posttagmezoj ne metis sin en iujn ruinaĵojn por bruligi tie malgrandan fajron, kaj tiujn, kiuj neniam gustumis la simplan vespermanĝeton, en lernejlibera ĵaŭdo, apude de arbetaĵo aŭ en alia loko, kie oni povu senti la nedireblan ĉarmon de malvasteco poezia kaj ama.

Ĉu ĝi estas nia instinkto de animaloj timemaj kaj malfortaj, kio nin igas ami tiun plaĉan kuntiriĝon, tiun amindan malvastigon de la lokoj kaj de la aĵoj, tiujn ĉirkaŭpremojn protektantajn kaj varmajn de la naturo? Ĉu eble tio estas troglodita atavismo, kiu persistas tra la jarcentoj spite nia animo fiere progresema?

Mi ne scias, mi nur kredas, ke ne decas tro moki la poezion, kiun eble trovas la grilo meze de la grenkreskaĵoj, enigante sin en la malluman trueton, nek tiun, kiun certe sentas la heliko, kuntiriĝante en sian perlamotan dometon, nek tiun, kiun povas ĝui la barbfiŝo en la diafaneco de la akvo, sub ŝtoneto en la ombro de la betuloj.

La simplaj kabanoj de la arbarloĝantoj ankaŭ produktas altan impreson rilate al la poezio de la konstanta sinmovo. Ili estas loĝejoj konstruitaj laŭ la hazardo de la laboro por travintradi en ili kaj poste ilin forlasi, sen bedaŭro, sen rememoroj, trenate de travaganta vivo.

Ili havas malpezecon de nesto sen patrinaj malkvietoj, nesto de stoikulo, de rezignacia malsukcesinto, de libera

izolulo. Ili ne havas la teruran senmovecon de la antikvaj palacoj, kie finiĝas la vivoj, ne lasante alian postsignon krom malvarmaj memoraĵoj, forigotaj kun malŝato de la venontaj generacioj kaj konservotaj pli poste kun kalkulita avareco. En ili vi ne sentos ian resonon de pasintaj malfeliĉoj, nek vibras tie la eterna minaco de la homa fatalo.

„Tiu ĉi lito saturiĝos de la ŝvito de via agonio; en tiu ĉi ĉambro korbatos via spirito dum sia elliberiĝo; tra tiu ĉi koridoro oni forportos vian kadavron, kovritan per morttuko en la nigra ĉerko.“ Tion sibladas la vento en la vastaj patrodomoj; tiu ĉi estas la dolĉa certeco de la heredontoj.

La kabano de la karbfaristo pensigas vin nur pri la plumba dormo de sana organismo; pri feliĉa simpleco kaj pri iu laboro, kiu, se ĝi foje iĝas troa, tamen ne venenas nek turmentas, nek putrigas la animon, ĉar tiun laboron lumigas la sunhelo, ŝirmas la lazuro, incensas la bonodoroj de la arbetaĵoj kaj prikantadas la birdaro. Kaj ĉe la ektrovo de tiaj kabanoj forlasitaj meze de monto, detruitaj de la kruda vetero, kun la aro da ripoj putriĝinta kaj senkarnigita kvazaŭ mortrestaĵo de fidela besto, ili produktas al vi nenian ĉagrenon. Ili estas nesto de birdo forfluginta por kanti en alia montaro, grati en alia montflanko, ornami per sia nigra kaj kvieta figuro alian solecon. Tie li estas konstruinta novan nestejon, tiel malgrandan kaj amindan kiel la antaŭa, tiel similan, ke ĝi estas preskaŭ tutegala; li nur ŝanĝis je horizontoj, kun sama facileco, kiel urbano ŝanĝas la kurtenojn. Se li havis dolorojn, malfacilaĵojn aŭ ĉagrenojn, ili restas en

la malnova kuŝloko, ĉe la maldelikata kuseno, meze de la pajlo.

En la fundo de mia koro enamiĝinta je la kruda belegeco de la kabanoj, ekestis kelkfoje iom da kompato pri iliaj loĝantoj. Mi imagis ilin malsanaj tie, senfortigitaj de la malsano, mortantaj sen la konsolo de receptaĵo kaj sen la klasika ŝultrokuntiriĝo de la nescianta scienco. Poste ankoraŭ mi min demandis, ĉu eble ili trenadas sian liberecon kiel ĉenon; eble la vastecoj de la montaro estas por ili kvazaŭ la malgaja kaj teda ĉelo de karcero. Terura kutimo blasfemi, kiun en mi naskis la timema, iluziema kaj senforta gento de la urboj!

Mi ja ne vidis ilin sopiri pro envio, kiam ili loĝas en la bele ornamitaj ĉambroj sinjoraj. Ili eliras el ili kiel eble plej baldaŭ, ilin ili miras kaj forlasas. Mi povis observi tion, ĉar iafoje mi loĝigis ilin ĉe mi. Ili forkuris de ĉe mi jam frumatene. Kaj ĉu vi scias kien ili iradis? Vastigi la pulmojn, for de la stratoj, malproksimen; renkonti la matenan nebulon, la odoron de la kamparo, la oran sunleviĝon.

Ni, ni estas la malriĉuloj, la mizeruloj, kiuj iras envii lin, lin kaj liajn trezorojn: lian heroan krudecon, lian denaskiĝan fortecon, la serenecon de liaj okuloj kaj la belan simplecon de lia palaco.

Ho, malŝatindaj litoj, abomenaj dormoĉambroj, teruraj kurtenoj blankaj, malgajaj marmoroj de la familiaraj mebloj, kiuj konservas ankoraŭ makulojn de kuraciloj, super kiuj viaj manoj tremis en la senfinaj noktoj, kiam forlasite de ĉiuj, kvazaŭ vi estus en dezerto, vi preparadis senefike la lastan laŭmodan formulon, la plej bonajn

drogojn de la apoteko, dum kriadis la doloro sur la molaj matracoj!

Diru al mi: en kia angulo de via urba loĝejo ne falis larmo, en kiu ĉambro ne restas ankoraŭ iaj febrodoroj, malantaŭ kiu pordo vi ne aŭskultis ian doloran singulton aŭ iun flustron malbonaŭguran?

Aranĝu vian kaĝon zorgeme, metu en ĝi pendornamaĵojn, plenigu ĝin per belaj objektoj, elektu la plej bonan lokon por akcepti la indiferentajn vizitantojn, tiujn kiuj ne lasas alian rememoraĵon krom la koto de iliaj ŝuoj sur la tapiŝoj; vin ĉirkaŭigu per ĉiuspecaj komfortaĵoj! Vane estos: la medio de neŭrozo, de lukto kaj de maltrankvileco, kiu supreniĝas el la brua strato, trapenetros vin tute, malagrabligos vian vivon. Necesas ĉiam pensi, ke vi havas meblon kun malgranda tirkesto, kie via edzino, per siaj mastrinaj fingroj, senĉese bekfrapadas kvazaŭ mallibera koturno en sia manĝejo, kaj vi devas eliri ĉiun matenon kaj ĉiun posttagmezon, ne gravas kien, por bataladi, por enmeti viajn manojn ne tiel plaĉajn nek tiel purajn en la tirkestojn de aliuloj, por fari sangon, fari hipokritaĵojn, sufoki la aliajn, riski vian propran vivon. Kaj ve al vi, se vi estas malkuraĝa! ve, se via konscienco timiĝas kaj viaj manoj hezitas! Sentaŭgulo, mallaborema, senpova, malforta, malkuraĝa ... Ho! ne timu, mi certigas al vi, ke da vortoj ne mankas sufiĉe en la vortaro ...

. . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

La tagoj klaraj kaj serenaj, kun forta malvarmo, estas la plej bonaj por la karbfaristo. Li ellitiĝas je la ektagiĝo, sen troaj ceremonioj; per piedbato li faligas la

fasĉinon, kaj blovo de malvarmo penetras en la kabanon. La kampoj blankas en la malproksimo, la boskaj arbetaĵoj estas kovritaj de iom da prujno, la malmoliĝinta tero krakas sub la piedoj, kaj en la ĉielo ankoraŭ lumas la steloj. La karbfaristo streĉas sian zonon kaj dume rigardadas la nebulan horizonton. Bonan tagon! li pensas, kaj li ĝojiĝas. Antaŭ ĉio, li ekbruligas grandan fajron. La branĉetoj kaj la malsekaj uleksoj malfacile bruliĝas: ili multe fumas, multe bruas, multe krakas kaj fine ekflamiĝas. Li kuŝiĝas apud la fajron, kaj li pasigas la malvarmiĝintajn manojn tra la flamoj, kiuj, en la blueco de la frumatena duonlumo, alprenas vivajn sangajn ruĝojn. La karbfaristo matenmanĝas en la sama sinteno. Li havas apude la botelon kaj prenas la tranĉilon kaj grandan pantranĉaĵon, kiu, en la nigreco de la fingroj, blankas kiel la neĝo.

La ventetblovoj ofte igas lin ĉirkaŭata de fumo kaj de fajreroj.

La ĉielo iom post iom alprenas palan rozkoloron. Grandaj aroj da piroloj flugas al la ebenaĵo, kaj perdrikoj kantas en proksima monteto.

La unua rigardo de la leviĝinta suno surprizas la karbfariston kun la leda botelo levita por trinkado; brilas kvazaŭ rubeno la falanta vinŝpruceto; liaj okuloj fermiĝas, helblindiĝintaj; liaj dentoj brilas tinkturitaj de skarlato, kaj tuta lia figuro bruna kaj nedelikata ekbruliĝas kun bronza reflekto.

Kaj li ne plu sentos malvarmon dum la tuta tago.

Ho, karbfaristo, bona karbfaristo! mi volus pruntepeti vian kabanon: mi havas molan matracon, kaj mi ne

povas dormi; miaj vizaĝo kaj manoj estas puraj, kaj mi estas pli timiga ol vi; mia domo estas vasta, pura kaj ordaranĝita, kaj en ĝi mi ne estas komforta. Mi volus pruntepeti de vi ĉefe vian pordon el fasĉinoj. La mia estas masiva kaj resonanta, ĝin ofte frapas la mizero kaj la perfido, kaj sub ĝi enŝoviĝas la banala ĵurnalo, la funebra sciigo, la miasmoj kaj la murmuradoj. Ho! via diskreta pordo, sub kiu traglitas nur la saniga venteto, la ekheloj de l' tagiĝoj, la mistera fosforeskado de la steloj kaj la arĝentaj fadenoj de la luno!

# LA KAMENOJ DE LA GASTEJOJ

Kiam dumvintre mi iras al la montaro por fari miajn malgrandajn ĉasadojn kaj samtempe prizorgi mian bienon, kiun mi administras ekskluzive por profito de aliuloj, de la Ŝtato ĝis la animoj de la Purgatorio, mi kutimas halti ĉe la gastejoj.

Tio ĉi estas kutimo tre plebeja, kiun mi sekvas kun neklarigebla persistemo, ĉar mi pensas, ke estas necese manĝi, trinki kaj varmiĝi, kio estas ĝuste la penso de la vulgaraj kaj simplaj personoj tie ĉeestantaj.

Kion mi diros . . .? mi ja volus esti milda spirito sentanta abomenon restadi en tiaj lokoj: sed, malgraŭ mia volo, tie mi min sentas ravata kaj kvietigita, ĉar, en ĉio, de la pinarba branĉo, kiu pendas supre de la blankigita pordo, ĝis la lasta angulo, kie kuŝas meze de araneaj teksaĵoj la barelo da bona vino enlanda, mi vidas ion plaĉan, kio min interesas kaj allogas.

Nenie regas tiel granda harmonio kaj sincereco kiel ĉirkaŭe de tiuj malavaraj fajrujoj de la vilaĝaj gastejoj. La viroj eniras piedfrapante, kun manoj en poŝo, kun la ĉapo alpremita kaj la pinto de la nazo ruĝa, spirblovantaj kvazaŭ lokomotivoj: Brrr. . .

Ekstere, la prujno malmoligas la vojojn, blankigas la pajlejojn kaj la tegmentojn, kaj pinĉas la orelojn. La

alvenantoj komentarias tion, alproksimiĝas senceremonie, prenas seĝon aŭ ne prenas, sed ĉiuj etendas la piedojn al la flamoj; kaj ĉiam enpremiĝas en la rondon unu pli, ĉar ĉiu volonte kuntiriĝas. Se la ĉeestantaro estas tiel supermezura, ke la rondo iĝas nepenetrebla, tiuj jam varmiĝintaj apartiĝas kaj lasas lokon al la pli bezonantaj, al tiuj, kiuj tie malantaŭe atendas kviete kuntiriĝintaj en la ĉarpioj de eluzita trikoto aŭ promenante ŝirmitaj per siaj lankovriloj, kiujn ili senzorge trenas kaj malpurigas tra la planko.

Kaj la servistino de la gastejo, kiu kutime estas malbela kaj dika, kun malicaj okuloj kaj ŝatinda submentono, eltrovas rimedon ankoraŭ alveni al la fumaj brulŝtipoj, ŝi submovas, aranĝas, blovas, flamigas ilin, ŝi eltiras brulaĵojn per la ŝovelilo, ili falas, ŝi prenas ilin denove per la fingroj, zorgeme, kun mirinda imuneco, dum ŝi ridetas al la dusencaj vortoj kaj forigas siajn fortajn brakojn, kovritajn de vira vilo, for de la kuraĝema palpado de iu manaĉo, kaj poste ŝi malaperas urĝema, brue frapante per la galoŝoj, kun la jupo suprentirita sur la flankojn, montrante dum la belmova irado la superbelan ekkurbiĝon de siaj tibikarnoj, kies molaĵo blanka kaj premita ekvidiĝas tra la malplektiĝintaj trikpuntoj de la nigra kaj strečita ŝtrumpo.

Ĉiam estas apud la varma cindro iu panrostilo provizita per grandega pantranĉaĵo, iu poto da vino varmiĝanta, iu haringo kiu rostiĝas, aĵoj kiuj restas tie sub la lojala protekto de la personoj plej apudaj; kio ebligas, ke la haringo ne fariĝu karbo, nek la pano bruliĝu, nek la vino elverŝiĝu.

Poste tio pasas de mano en manon, ĝis ĝi alvenas ĉe tiu, al kiu ĝi apartenas. Se estiĝas konfuzo, se estas du, kiuj ĝin petis samtempe, ili partigas ĝin kiel bonaj fratoj, kaj denove oni provizas la panrostilon, plenigas la poton kaj ĵetas sur la cindrovarmon alian haringon.

La paco regas ĉiam. Aŭdiĝas ŝercaj paroloj, trankvilaj diskutoj pri la prezo de la brutaroj, la kulturado de la kampoj, la bona aŭ malbona rikolto proksimiĝanta. Oni parolas pri la morto de iu maljunulo; oni komentarias proceson; oni sin plendas pri la malbonsorto de iu malriĉa familio, kiu havas filon en militservo; kaj oni filozofas malgaje pri „kio estas la mondo", meze de afablaj ridetoj.

De tempo al tempo eniras ĉaristo kun la vipo sur ŝultro, kriante pli ol ĉiuj. Li postulas, ke oni urĝe lin servu kaj servite li forgesas pri sia urĝemo; li metas la piedojn laŭeble sub la krurojn de tiuj kiuj varmiĝas, kaj li alkroĉiĝas al la ŝultroj de la proksimulo por konservi la ekvilibron; li miksiĝas en la konversacion, lasas elfali sentencon kiu silentigas ĉiujn, kaj denove li petas trinki. Jam kun la glaso en la mano, lia ĉaro ekmoviĝas. Sonoras la tintiloj kaj resonas la radferaĵoj sur la malmolaj ŝtonpecoj de la vojo, kaj li per sola plenbuŝo ensorbas la brandon, li ĵetas ekkrion de satulo, klaketas per la lango, blasfemas kaj rapideme eliras.

Poste venas la malnovaj klientoj, la intimuloj, tiuj, kiuj mem detranĉas la panon kaj mezuras la vinon; kiuj manfrapas la dorson de la mastrino kaj pinĉas la femurojn de la servistino. Tiuj prezentiĝas je la horo de la matenmanĝo. Ili estas najbaroj aŭ terlaboristoj, kiuj

faras sian ĉiutagan viziton, kiam la flamoj de la kameno ekmortiĝas kaj la trairantoj, kiujn la senkompata frumateno kunigis, marŝas jam, sub plena suno, al siaj aferoj.

La trairantoj de la gastejoj! Mi ne scias kia sorĉo restigas min ĉe ili; mi ne scias kian sugestian efikon ili havas sur min! Ĝi estas eble la bona akcepto, kiun ĉiam mi trovis ĉe ili, la frapanta allogo konatiĝi kun harditaj homoj, kun aventuremaj kunuloj, kiuj trairis la samajn vojojn, kiuj konas la samajn rektirejojn, kiuj venkis la samajn barojn: la lignotabulon moviĝeme kuŝantan super torento, la pasejon el ŝanceliĝantaj ŝtonoj, la glitigan deklivan vojeton, la koton, la mallumon, la malvarmon, la pluvon kaj la ventveteron. Homoj, kiuj dum momento kunpartigas kun mi la komforton de varmiga kuirejo, la pecon da pano, la kruĉeton da vino, kaj kiuj afable parolas kaj konsilas min, kaj montras sin komplezemaj, ĉar nenia intereso koncernas ilin kaj ili scias ke baldaŭ ni disiĝos kaj eble neniam plu ni revidiĝos, ĉar la mondo estas vasta kaj ilia vivo kaj mia iras diversflankajn vojojn.

De tio venas tiu ravanta konkordo kun ĉiuspecaj homoj: karbfaristoj brunaj, saturitaj de akraj elspiroj de la bruliĝinta lignosuko; arbosegistoj kun grandaj lipharoj kaj sangfluriĉa kolo, odorplenaj je rezino, kiuj amasigas siajn ŝtalajn laborilojn en angulo, kun teruranta bruo; brutarvendistoj kun longaj kiteloj kaj fraksenaj bastonoj, afablaj kaj amuzaj, kiuj pagas la ŝuldon kun trankvila gesto, tirante el la larĝa zono sian ledan saketon plenan da arĝento; arbarloĝantoj mizeraj, de timiga aspekto, kiuj

marŝas al sia malproksima kabano, farita el trunkoj kaj kovrita per ŝtonoj kaj terbuloj, kun la sako provizita, la kamizolo ŝvitplena, sen zorgo en la vestaĵoj, maĉante la pinton de la estingita cigaro, kiu fulgplenigas al ili dentojn kaj lipojn, kaj kiun ili ne rebruligis kun la subtila intenco, ke ĝi plue daŭru.

Ne klopodu scii kiajn strangajn malvirtecojn, nek kiajn malbonajn instinktojn gardas en sia kruda animo tiuj kompatindaj trairantoj, kiuj sidiĝas momenton apud vi, nur la tempon necesan por sekigi siajn piedojn, engluti pecon da pano kaj trinki iom da vino, dum ili vin rigardadas scivole kaj penas sciiĝi kiu vi estas. Nenion signifas ke en la arbaraj solecoj, sub la tegmento de la ruiniĝanta domaĉo, kie tusas la edzino, ploras la gefiloj kaj tremas la bovino agonianta, la kamparano pripensas krimajn aferojn. Li nun estas optimisto de la vivo, lia korpo reviviĝas, en la nuna momento li liberiĝas de la malvarmo, de la pluvo, de la ĉagreno kaj de ĉiuj korpremoj ĉielaj kaj teraj lin torturintaj dum la tago, kaj nun li sentas inklinon al la bono kaj malavareco, kaj li volus pagi al vi glaseton da ranca vino per la lastaj rustplenaj kvin centimoj, kiuj restas en la poŝo de lia dispeciĝanta veŝto.

Vi povas foriri kun li kiel kunulo tra dezertaj vojoj, en plena nokto, en plena mallumo, ne timu; la bonfara influo de la gasteja kameno daŭre forigas de li ĉian malbonan penson, eĉ se li estus ema havi ilin, kaj certe li partigus kun vi la plej grandajn danĝerojn, kiel antaŭe li kunpartigis la pecon da bruna pano.

Nenie en la mondo estas pli facile veki la estimon de

la kamparanoj nefidemaj kaj premegataj de la laboro kaj la mizero. Sufiĉas elmontri, ke vi scias kio estas sufero, ke vi ne estas fiera, ke vi malamas la sekretariojn de vilaĝo, la juĝistojn kaj la advokatojn, kaj ke vin ne timigas la rigoroj de l' ĉielo nek la krutaj vojoj de la tero. Tiam vi estos kun estimo de ili konsiderata, kaj eĉ via hundo havos bonan kuŝlokon en la rondo, sub la granda kamentubo.

Ĉe la gastejaj kamenoj vivas ankoraŭ la frateco kaj harmonio de la klanoj de la prahistoria aĝo. Ili estas la komuna hejmo de la senhejmuloj. Angulo gastama kaj sankta, kien ne alproksimiĝas la bruema junularo de la festotagoj, nek la persistemaj ebriuloj, nek la kartludistoj obstinaj. Tie vi renkontos ordinare la mueliston vidvan, kiu, dum la liberaj horoj, ne scias resti en sia muelejo malgaja kaj silenta; la kamparanon vundiĝintan pro falo, kiu lamirante prezentiĝas, frumatene, por distri sin de sia deviga senlaboro kiu lin ĉagrenas; kaj la neeviteblan mallaboremulon, abomenitan de ĉiuj, iom idioto, kampara histriono, kiu ĵus leviĝis el dormado ĉe la pajlejo kaj sekvas per senviva rigardo, plena de hontinda voluptemo, ĉiujn movojn de la grasa servistino. Aldonu ankoraŭ, la maljunulon kadukan kaj forlasitan, kompatinda invalido kiu per dek centimoj manĝas, trinkas, varmiĝas kaj iluziiĝas je la feliĉeco de fremda hejmo, kiun li fine eĉ imagas propra. Tie ankaŭ, preskaŭ ĉiam, li povas luladi infanon aŭ distri ĝin per la moviĝo de brulanta branĉeto, kaj ricevi la kareson de paŝtista hundo endormiĝinta apud la cindro.

Ho! kredu, ĉio malnobla kaj abomeninda el la senaga

restado en la gastejo, ĉirkaŭe de la grandaj tabloj bruoplenaj pro la frapoj de la kartludistoj kaj la kantaĵoj de la ebriuloj, nobliĝas dumvintre per la ekzorcismo de flamanta fajro kaj per la familia kuniĝo en la fuma kuirejo, meze de infanaj ploroj kaj ridoj, patrinaj kisoj kaj bruetado de marmitoj odorantaj tiel, kiel tiuj de via hejmo.

Mi povas diri, ke ĉiufoje kiam mi sidiĝis tie, estis al mi malfacile ekiri for. Neniam tie mi sentis tiun malgajigan impreson, kiu subite aperas al mi, kiam mi troviĝas sola en la grandaj urbaj hoteloj. Mi ne scias kian neplaĉan aspekton de malvarma gastameco havas la longaj koridoroj, la ĉambroj, kaj la tabloj pretigitaj zorge kaj simetrie; nek kion mi trovas malamika kaj fiera en la rigardo de la gastoj, nepenetreblaj sub sia afektita singardemo, senkarakteraj pro identaj manieroj kaj pro la samaj ceremoniaj movoj. Malgraŭ la komforto de bona lito kaj bona tablo, daŭran frostotremon oni sentas en la koro; oni nostalgias je intimecoj, sincereco, frateco . . .

Ĉe la gastejaj kamenoj la homoj montras sin ĵus alveninte; nur unu vorto, unu ekkrio, unu gesto malkovras ilin. La animo ĉe ili diafane vidiĝas tuj, mirakle, pro la varmo, kiu senrigidigas al ili la membrojn, kaj pro la glaso da vino rekomfortiganta la stomakon.

Kiu volas trapenetri en la erarigan komplikecon de la kamparana animo, tiu haltu kaj travivu kelkajn horojn meze de la irvenantoj de tiuj kamenoj vilaĝaj, komunaj al ĉiuj.

Ili ĉiuj havas ion aparte interesan, elvokantan la medion kie trafluas ilia vivo. Kaj la koto de iuj galoŝoj, la

substofo de iu jako, la kripleco de iu membro, la morta haŭto de iuj manoj, la flikaĵoj de iu pantalono kompletigas la naturvidaĵojn kiujn vi kolektis aŭ pretiĝas kolekti. Kaj aperas al viaj okuloj la silenta farmodomo, alkroĉita al senfrukta montdeklivo, melankolie rigardanta al la malproksimo, al la fruktodona ebenaĵo; la soleca kampo ĵus erpita, kun siaj nigraj terbuloj, kun siaj junaj kverkotrunkoj verdaj meze de la mortantaj arbustoj; la pinaro malluma kaj legenda kun la ruĝkoloraj maldensejoj, kie la rikoltistoj krevigas la pinfruktojn; la dehakata arbaro, kie la kolosaj arboj faladas kun uragana muĝado kaj montras la kompatindan nudecon de siaj senŝeligitaj trunkoj; la kaŝita krutaĵo, plena de mortaj folioj, kiujn maljunulo amasigas per bruetanta rastilo; kaj la supro de impona montflanko, kie la triumfa fosisto donas la lastan kaj bruan baton, glitigante la tenilon de sia pioĉo inter la kaloj de la malbelformaj manoj.

Kaj ĉio ĉi, kio estas ekstere, kio estas for, kaŝita de la nebuloj, de la nokto aŭ de la pluva vualo, parolas tie, spiras tie per buŝo de tiuj homoj, dum krakadas la flamoj, bolas la marmito ĉe la fajrujaj hokoj, kaj ĉe la fulgo de la buŝo de l' kamentubo kuras misteraj procesioj de malgrandetaj fajreroj.

Aŭskultu tiujn homojn, kaj vi scios kiom kostas eltiri tiujn herbaĵojn, faligi tiujn trunkojn, surgrimpi tiujn pinarbojn. Vi scios ĉi tion kaj kion povas la laboro, la rezistemo de homo; kiom oni gajnas amasigante tiun foliaraĵon, farante karbon el tiuj arbradikoj; vi lernos koni la valoron de multaj aĵoj kiujn vi kredis senvaloraj; kiamaniere oni povas gaje vivi manĝante bulbojn kaj

kuiritajn terpomojn; kiamaniere oni povas subteni kaj prizorgi la gefilojn per batoj de fosilo, amasigante ŝtonojn sur deklivoj preskaŭ neatingeblaj, gratante la teron per la ungoj, senŝeligante korkarbojn per la dentoj, kaj forlasante la semaĵojn al la volo de la Sanktuloj. La spirito de la montaro estos kun vi, vi divenos la intiman kunrilaton de la homo kun ĝi, kaj vi ĝin trovos pli gastama, pli malavara, kaj vi ĝin amos kun prefero.

Jen kion vi povos lerni, krom multaj aliaj aferoj, ĉe la kamenoj de la gastejoj.

# JOSAFAT

(Novelo.)

Fragmentoj de la ĉapitroj VI, VII kaj VIII.

## VI.

La amrilatoj de Josafat kaj Fineta daŭris duonan printempon. Kiam ŝi denove venis al li, li ja ne diskutis kun sia konscienco; sed kelkafoje la konsciencriproĉoj premadis lian animon. Ĉiun tagon, ĉirkaŭ la oka horo, dum li trairadis tra la preĝejo, li vidis, ke iu jezuito, kun tremantaj lipoj kaj neĝkovrita kapo, eniras en konfesejon. Tiam la sonorilejzorganto Josafat sentadis deziron purigi sin de ĉia peko, kaj malrapide li ĉirkaŭiris la apsidon kun intenco genufleksi al la piedoj de la konfesprenanto. Sed neniam li faris tion. „Morgaŭ", li pensadis. Li sciadis ke, konfesinte sian voluptamon, li neniel povus revidi Fineta. Ho, la amo de Fineta! Kun kia avido li ĝuadis ĝin, kaj kiel li atendadis ĝin ĉiun posttagmezon!

Li kutimis konduki la fivirinon supren, en la tubtegmenton, sur la granda volbo, kaj tie, sidante sur malnova tapiŝo, inter du kolonoj el tiuj subtenantaj la trabojn, ili interparoladis ĝis alveno de la krepusko. Komence

Fineta ne voladis sekvi lin: ŝi deziradis mallumon, brutalecon, manbatojn de sovaĝbesto, malmolecojn de granito, odorojn de kaverno, tutan ian deliron de amo kontraŭhoma, teruriga, kiu sukcesus tremigi ŝiajn malvirtajn internaĵojn, jam satajn de amoj ĉiuspecaj.

Tra la truoj taŭgantaj kiel ventoliloj eniradis klareco helblindiga, kaj Josafat satigis ĉe la fivirino sian scivolemon: eĉ ne unu beleco de Fineta restis por li nekonata. Li faladis en ekstazojn de stultulo; poste, satiĝinte, li ree riproĉadis sin.

Fineta aliradis al la sonorilejo en okazoj kiam, malkontentigita de karesoj defalintaj tuj post komenco, ŝi nostalgiis je la kruda energio de Josafat. Ŝi alvenis tien je la kvara posttagmeze, horo kiam nur iu bigota virino restadis antaŭ la preferata sanktulstatuo, kaj tiam, por kaŝi sian senĝenan aspekton, ŝi vestis sin nigre, kovrante sian brilan hararon per mantilo, kaj eĉ, se ŝi timis, ke oni spionas ŝin, ŝi, surgenuante ĉe la ŝtupoj de iu kapelo, flustrigis siajn lipojn. Ŝi klopodadis laŭeble ne kompromiti Josafat, kiu kelkajn tagojn estis skuata de timo neniom trankviliga. Kaj tiu sinteno de pentanta virino favoris ŝin, kaj ĝi plaĉis al ŝi pro la novaspekto, kiun ĝi enkondukis en ŝian vivon, tiel riĉan pri aventuroj.

Tie, supre sur la volbo, ŝi denove estis la virino pasia: ŝi forĵetis siajn vestojn kaj kun pozoj de bakĥaantino delirigis la faŭnuson. Ŝi instruadis lin, enkondukante lin iom post iom en la malvirton: ŝi lernigis al li lian rolon de orangutango kaj sukcesadis logi lin en la malplenon de la pordo, interne de la ŝtuparo, tie kie li ĝuis ŝin

la unuan fojon. Ŝi parodiis la timon de virino rabita, kaj li — la bestan amon, la nesatigeblan avidon de simio.

Tiuj intimaj orgioj senfortigis la sonorigiston kaj forprenis de li ĉian energion, igante lin ludilo de Fineta, kiu tagon post tago lernigis al li ian novan rafinitaĵon, invitis lin al nova aberacio.

— Batu min, Josafat; — kaj li ŝin traskuadis per siaj manaĉoj, sen ia priatento, prenita de tiu nenatura volupteco.

Kiam alproksimiĝadis la varmegaj noktoj, Fineta ne ŝatis surmeti la vestaĵon, kiu ŝvitigis ŝin, kaj eliri al la strato por reveni en sian liton de prostitulino, kie ŝi sufokiĝis de varmo, elportante la malfortajn ĉirkaŭpremojn de iu mallerta junuleto aŭ la ceremoniajn afablaĵojn de iu idiota maljunulo.

— Ĉu vi volas, ke mi restu tie ĉi, Josafat? — ŝi diris al li iun varmegan vesperon. La sonorigisto sin montris iomete trankvila.

— La tutan nokton?

— Tutan, — kaj ŝi rigardis lin en iu maniero kvazaŭ farante al li proponon de io senfine plaĉa, kion li ankoraŭ ne revis. La sonorigisto mallevis la kapon kun rezignacio.

Ili ekiris al lia ĉambro, sed, por ne trapasi tra la „trifori" kaj ne tenti Dion, ili komencis fantazian pilgrimadon tra la deklivoj de la tegmentoj, ĝis ili renkontis la turon, tra kiu ili malsupreniris en la terason, kaj ili eniĝis en la izolitan ĉambron sen aerumo, kiu preskaŭ haladzis.

Fineta, dume, ĝuis ĉiujn terurojn kaj ĉiujn ektrem-

iĝojn: ŝi aŭdis la krion de la strigoj; ŝi antaŭsentis la abismon volantan ensuĉi ŝin; la noktbirdoj, apud ŝia kapo, traflugis malrapide, movante senbrue siajn flugilojn; sub ŝiaj piedoj naskiĝis misteraj krakadoj; dormantaj sonorecoj vekiĝis je la rebruo de ŝiaj paŝoj; makabraj fosforeskaĵoj aperis malsupre, ĉe la abismo. . . Kaj kiam Josafat, jam certa pri tio, ke la lumo ne estos vidata, ekbruligis la pecon de kandelo, kiun ĉiam li portis kun si, novaj ektimoj alvenis persekutante Fineta, kaj tie ĉi kaj tie, en ĉiuj lokoj, la dikaj mallumoj, kiujn la kandelo ne povis forigi, sugestiis ŝin, vidigante al ŝi fantomojn, aŭdigante ĝemojn, plenigante ŝian gorĝon per histeriaj krioj, kiujn ŝi retenis por ne kolerigi la sonorigiston.

La teruro nuancigis tiun nokton de amo.

. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

— Kiam estos mallume, vi devos foriri.

Fineta ne respondis. Tuta ŝi humiliĝis; sidanta ĉe la rando de ŝtupo, ŝi kuntiriĝis malgaje, malgrandiĝante, kvazaŭ ŝi volus elmontri, ke ŝi ne malhelpas. Poste, per la rigardo, ŝi preĝadis kompaton.

La mallumo densiĝis en la ĉambro, kaj ili, mutaj, senmovaj kaj lacpremitaj, kaŝe rigardadis unu la alian.

Kiam venis la momento, Josafat ekbruligis la kandelpecon, malfermis la pordon, kaj atendante, ke la virino sekvu lin, li distriĝis rompante la solidiĝintajn vaksgutaĵojn de la kandelo.

— Nu, kion vi atendas?

Fineta ankaŭ ne moviĝis. Ŝi profunde sopiris, por montri la ĉagrenon, kiun al ŝi produktas la ama nokto kiun ŝi perdos.

— Nu, — ripetis la sonorigisto — vi devas foriri. Devas finiĝi tiuj ĉi aferoj.

— Kial, Josafat? kio timigas vin?

— Ĉio. Preskaŭ oni malkovris vin, hodiaŭ. Mi ja estus en embaraso!

— Bone, Josafat, ni adiaŭiĝu; — kaj ŝi alproksimiĝis al li kiel la unuan tagon, montrante la plenajn flankojn, kliniĝinte malantaŭen, prezentante la sinon, ekkomencante la erotikan ekmoviĝon.

Li klinis la kapon kaj flaris ŝian hararon, premante ŝin dum momento per siaj atletaj brakoj.

Ektremiĝo de ĝojo serpentiris tra la dorso de la knabino, frizante la oritan vilon de ŝia nuko.

Kiam la sonorigisto malligis siajn brakojn, ŝi daŭrigis puŝadi lin per sia mola karno, kiu glitadis sub la malstreĉitaj vestoj, kaj poste, per siaj varmetaj manoj, ŝi komencis karesadi liajn hirtajn harojn.

. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

Kiel li estis falinta alian fojon! Kun kia malforteco li cedis antaŭ la kaprico de tiu virino! Li memoradis la nokton ardegan, la nokton frenezan, la nokton satanan kaj demandadis sin, ĉu li havos kuraĝon elliberiĝi por ĉiam plu de Fineta. Li ja riskadis ĉion! la eternan gloron, la estimon de liaj protektantoj, la ĉiutagan panon kaj eĉ — kial ne konfesi tion? — la eblecon havi la deziritan interparoladon kun Pepona. Kien li estis alveninta! Estis tiel granda la haladzo de malpureco, kiun enfermis lia ĉambro, ke ĉie disvastiĝis io kvazaŭ fumvualo de l' malbona spirito, transiĝante tra ĉio, malpurigante ĉion per malĉastodoroj. Li mem, lia propra korpo,

frotiĝinta horojn post horoj kun la febroplena karno de la malĉasta virino, eligis sakrilegiajn efluvojn, kaj ĉie, kie li trapasis, li postlasadis nigran kaj haladzan postsignon, kiu devigadis la sanktulojn naŭze grimaci, plorigis la virgulinojn kaj malgajigis la rigardon de Nia Sinjoro.

Ĉiumatene, kiam la pastroj preĝadis la diservojn en siaj kapeloj, ili aspektis malkvietaj, kvazaŭ prisentante polverojn de peko tra la aero; kaj, ĉe la levado de la hostio, ili montris fervoron de pardonpetanto, kun pentanta rigardo, petegante kompaton por la kaŭzanto de la terurega profaniĝo de l' preĝejo.

. . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

— Ha, Fineta! longa tempo forpasos, antaŭ ol vi eniros denove en ĉi tiun ĉambron.

Ili pasigis la tagon sen reciproka parolo: senefikaj estis la tentoj de Fineta por revigligi la sonorigiston; ne sukcesis ŝercoj, nek seriozaj vortoj; nenion povis ŝia delikate velkanta brusto, tremanta sub la faldoj de la mola korsaĵo; nenion — ŝiaj ondantaj flankoj senĉese trapasantaj kontraŭ la senmovecaj okuloj de Josafat; nenion la karesaj Joĉjaj nomoj abunde fluantaj inter raŭkaj sopiroj; nenion la fingroj longaj kaj karesemaj, malordigantaj la harojn de la kapo de la sonorigisto, kliniĝinta de honto kaj plena de intencoj pri sincera pliboniĝo. Tempo perdita. — Foriru, — li diradis senŝanĝe, sen kolero, sen timo, kun indiferenteco de viro malfortigita de la pasintaj diboĉaj noktoj.

La venkita faŭnuso, kun sia mieno de senpoveco, kaŭzis impreson ĉe la fivirino, malkvietigis ŝin, pli ol

la viro brutala, timinda en siaj malŝatoj, sovaĝa en siaj koleroj, kruela en siaj amoj.

— Tio forpasos, — ŝi pensadis, — li estas mia viktimo. Kaj en ŝia malvirta interno naskiĝis ia stranga kompato, kiu denove ardigis ŝin kaj dezirigis al ŝi ankoraŭ la lastan eron de vira energio, kiu povus resti ĉe la sonorigisto.

Ŝi alvenis ĝis la cinikeco plej senhonta kaj maldeca. Josafat malproksimiĝis, forkuris de la ĉambro.

Ĉe la vesperiĝo, Pepona venis renkonti sian kunulinon. Ŝi estis maltrankvila; du noktojn ekstere estis tro multe. Ŝi renkontis la sonorigiston, kiam li finis la kutiman rondiron en tiu horo, kaj en la interno mem de la bapteja kapelo ŝi demandis lin pri Fineta.

. . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

Tie Fineta, ĉe la renkonto de Pepona, divenis tion okazintan; histeria furiozo kuntiris ŝiajn trajtojn, kaj per krieganta voĉo, senfine abomena, ŝi ĵetis sur sian kunulinon la tutan venenon de sia maldeca lango; fluadon de fivortoj, kiun la alia virino akceptis, ilin respondante. Josafat, teruriĝinte, sin intermetis kaj forpuŝis la du virinojn.

— For, for!

Sed la pluvego de malpuraĵoj, la abomena torento, trapasadis sur li kaj bruadis en plena preĝejo, meze de la majesta navo, ŝprucigante koton kaj putraĵon sur la sanktajn aĵojn.

Apud la pordo, Fineta sin ĵetis al la kolo de la sonorigisto kaj kisis lin ĉe la buŝo, unu, du, tri fojojn, ĝis

nerezistebla forpuŝo disigis ŝiajn brakojn kaj ĵetegis ŝin kontraŭ la pordon.

La du virinoj eliris. En la placo ili daŭrigis la disputon. La voĉo de Fineta estis la lasta, kiun aŭdis la sonorigisto:

— Eĉ se vi ne vidas min dum du aŭ tri semajnoj, neniam plu vi denove renkontu min. —

Josafat restis sola. La solena grandeco de la templo parolis al lia animo.

— Vi malpurigis la domon de l' Sinjoro; pro via kulpo la fivirinoj eniras en ĝin por kontentigi sian malsatantan volupton, kaj, kvazaŭ en bordelo, ili baraktadas, ĵetante al la kvieta vizaĝo de la sanktuloj la tutan abomenon de sia malnobla korpo. Pentu, petu pardonon, Dio rigardas vin!

En la nokto li havis antaŭ si, severan, fiksan, serene rigardantan, la okulon de la Eterna Patro, kiu ne lasis lin ripozi.

Kiam la turhorloĝo malrapide sonoris dekdu horojn, Josafat komencis esploron de sia konscienco, kaj frumatene, kun la kapo humiligita, preskaŭ singulte plorante, li falis en la brakojn de l' jezuito kun tremantaj lipoj kaj neĝkovrita kapo.

## VII.

. . . . . . . . . . . . . . . . . . .

Josafat rigardis nur dum sekundo la fivirinon; poste li turnis al ŝi la dorson, lia vizaĝo kovriĝis de severeco, du sulkoj aperis ĉe liaj vangoj, liaj lipoj murmuris ion similan al preĝo, kaj lia tuta longa korpo alprenis solenan rigidecon.

En la buŝo duonmalfermita de Fineta frostiĝis ama saluto; ia antaŭsento tratranĉis ŝiajn internaĵojn, antaŭe ĝojajn kaj plenajn de promesoj. Tamen, ŝi antaŭeniris malrapide, ĝis ŝi alvenis apud la sonorigisto, kiu rigardis ŝin kun singardemo.

— Apartiĝu, prostitulino — estis liaj vortoj —; apartiĝu, foriru, nenion vi devas serĉi en tiu ĉi loko. — Kaj li kunpremis siajn pugnojn de giganto, firmajn, malmolajn kiel la ŝtonkvadratoj de lia sonorilturo.

— Kio estas tio, Josafat? Tiele vi atendas min post tiomaj tagoj da foresto? Tiele vi akceptas min, kiam mi vin serĉas ardoplene, frenezeca je vi, deziranta je via amo kiel la unuan tagon? Adiaŭ, Josafat; mi foriras, ĉu vi aŭdas? sed mi ne rezignas je viaj karesoj; mi revenos kaj vi devos elporti min.

— Vi ja gardos vin bone, meti la piedojn ĉi tie.

— Kial, Josafat? Kion vi farus al mi?

— Ne necesas, ke mi klarigu ĝin.

— Ĉu vi min forĵetus?

— Mi vin forĵetus.

— Kaj kiel, Josafat?

Kaj Fineta alproksimiĝis al li alian fojon. Malgraŭ sia volo, la sonorigisto plene rigardis ŝin, kun malgaja rigardo. Kiel tiun tagon, kiam ŝi igis lin fari la unuan pekon, ŝi venis vestita kiel novedzino; la nigra robo donadis al ŝi gracion; sub la jupo, la malkvietaj flankoj moviĝadis volupte; en la korsaĵo la brusto leviĝis senpacience, maltrankvile, kun larĝa spirmovo, kiel tiu de dresisto antaŭ sovaĝbesto timinda kaj koleriĝinta.

Josafat rememoradis pri ĉiuj neimagitaj plenecoj de

tiu virina korpo; li sciadis la risortojn, kiuj frenezigis ĝin; li konadis ĝiajn ektremojn, ĝiajn agoniojn, ĝiajn reviviĝojn malrapidajn, absorbajn, tiranajn, kaj ĉio tio senarmigis lin, tenis lin senaga, malforta, sen kuraĝo por antaŭenigi la manon kaj forpeli la nepuran virinon.

— Apartiĝu, foriru! . . .

— Ne, Josafat, jam ne. Kial?

Ŝi alpremiĝadis al li. La sonorigisto sentadis en sia kubuto la molegan kontakton de la sino de Fineta; li rimarkis la ritman ondadon de ŝiaj spirmovoj, la malfortan batadon de ŝia eta koro, la pasian raŭkecon, kiu pasis inter ŝiaj dentoj, alpremitaj pro ĵaluza deziro, kaj la febran spirbloveton, kiu supreniĝis ĝis lia vizaĝo, ardigante lin.

— Josafat, vi devas ami min, ĉu vi aŭdas? Pro kio vi estas ofendita? Kion mi faris al vi? Kiu parolis pri mi malbonon? Ĉu vi volas, ke mi restu kun vi, tie ĉi, por eterne?

— Mi volas, ke vi iru for, ke vi ne alproksimiĝu, jen kion mi volas.

— Josafat! . . .

— Apartiĝu!

— Mi ne povas, mi deziras vin per mia tuta animo . . .

— Neniam plu, eĉ se vi mortiĝus.

— Josafat . . .

— For, mi diras.

Fineta antaŭenigis siajn manojn, kaj dorloteme, dolĉe, akcentante pli sian pasian raŭkecon, penis apogi sin al la sonorigisto kaj pasigi siajn fingrojn sur lia kapo por karesadi liajn harojn.

Josafat eligis krion teruran, nigran, mortanoncan:

— Fulmo trafendu vin! — kaj lia kubuto eniĝis kun forto en la molan mason de la brusto de l' fivirino.

Poste, kun la sama facileco kiel li kaptis la ŝnurojn de l' sonoriloj, li prenis la delikatajn brakojn de Fineta por ĵeti ŝin en la straton, sed tuŝante ŝin, sentante ŝian haŭton glitantan sub la silko, li ektremiĝis kaj forlasis tiun kontakton, kiu revivigadis troajn rememorojn; li ekhavis timon pro tiu delikateco, tiel admirita kaj tiel volupte ĝuita.

Jam liberiĝinta, ŝi kuntiriĝis, kaj, intence fajrerumante per siaj verdaj pupiloj, ŝi mordetadis arterion pulsantan en la larĝa gorĝo de l' sonorigisto.

— Dispecigu min, sed vi ne atingos malproksimigi min de vi; mi ne foriros; tie ĉi vi havos min ĉiam dezirantan vin, vin kompromitantan, ĝis vi min amos kiel antaŭe.

Tion diris la knabino, kaj, rimarkante atakeman ekmovon de Josafat, ŝi aldonis: — Trenu min; nu, provu fari tion; mi krios, ĉiuj aŭdos min, se iu venos mi alpremiĝos al vi kaj mi klopodos kisadi vin, por ke oni tion vidu.

Ŝi ekiris sidi sur la skabelo de Josafat.

— Vidu, mi jam instalis min; nokte kaj tage mi atendados, ke via amo revenu.

En la baraktado malstreĉiĝis ŝiaj vestaĵoj kaj malordiĝis ŝiaj haroj. Ŝia malbonvola rigardo pasadis tra la falintaj haroringoj, kun brilo hipnota, incitanta, neelportebla, dum el ŝia ironia buŝo eliradis vortoj, kiuj disŝiradis la haŭton kiel vipobatoj.

— Malkuraĝa! hipokrita! Kiu konsilis al vi, kiu ordonis al vi, ke vi min forĵetu? — Kaj ŝi insultis la protektantojn de Josafat laŭ terurega maniero. — Vi fastu,

ili satiĝu. — Ŝi sciadis multe da historioj pri la sutanvestaitoj; kelkajn fojojn ŝi lasis sin subpremiĝi sub ili. — Ili pezas, pezadas; ili havas vian karton, Josafat; sed vi bone agas, ne fidante je ili; vin ili forigus, el la sonorilejo, sed min ili metus volonte en sian liton. Kredu al ili, Josafat, kredu al ili, estu bona homo. Vi fastu, ili jam satiĝas. — Kaj ŝi krevis je rido akra, dissonanta, demona, kaj ĵetis pli da sereno, pli da malamo, libere montrante sian koleron per cinikaj paroloj kaj maldecaj gestoj.

La sonorigisto rigardadis ĉirkaŭen, serĉadante ian ilon fortan kaj malmolan, taŭgan por diskrevigi per sola bato tiun kapon de skorpio, kiu lin incitadis, ĵetante al li per grandiĝantaj pupiloj la tutan nervan forton de ŝia histeria korpo, vibranta de kolero, plena de teruraj kriadoj.

Fineta eble komprenis la intencojn de la sonorigisto, ĉar ŝi restariĝis per epilepsia eksalto.

— Mi venis kun la internaĵoj brulantaj pro vi; mortigu min, sed mortinta kaj malvarma mi ankoraŭ vin deziros. — Josafat, kun sia tuta grandeco kaj sia tuta kuraĝo, ektimiĝis; tiel impona kaj decida staris Fineta. La fivirino ne elirus, estis senutile. Venis al li nepriskribebla timego, li kuradis freneziĝinta tra la malvastecoj de tiu ĉambro.

Subite, Fineta singulte ekploris: ŝi preĝadis almozon de amo, ŝi trenadis sin, humila kaj afliktita, profitante la grizan, bonvolan kaj tentantan lumon de la finiĝanta tago. Ŝi vokadis la sonorigiston per vortoj el tiuj, kiujn ŝi elpensadis en la grandaj erotikaj ekstazoj, en la grandaj spasmoj de plezuro, kaj serĉante lin, ŝi lin persekutadis

kiel malĉastema ombro, kiel fantomo infere pasiiĝinta. Kaj, kiel la tagon de ŝia unua venko, apud la cilindro de la malluma ŝtuparo de l' sonorilejo, meze de unu el la strecmovoj, kiuj ĉiam antaŭiradis ŝiajn plej terurajn amkrevojn: — Venu, venu, — ŝi vokis, kun voĉo de gorĝo raŭka kaj konfuza — fermu kaj venu. Ne povis finiĝi tiel nia granda amo; vi jam vidas tion . . . fermu kaj venu.

Josafat rapide iris al la pordo, sed anstataŭ fermi ĝin, li eliris eksteren kaj esplorrigardis la tutan templon. Tie malsupre, apud la kolonoj de la apsido, movadis sin silueto alta kaj severa; ĝi antaŭeniradis kun majesta malrapido kaj havis la respektindan graciaspekton de bonkora pastro.

La sonorigisto reiris malantaŭen, timoplena, kun ŝancelaj paŝoj, kun vizaĝo ŝvitplena kaj tragediaspekta. Li fermis la pordon. La fivirino, en sia loko, atendadis lin; ŝia nuda dorso briladis, ia ŝaŭma blankeco ĉirkaŭadis ŝian talion, kaj ĝis la piedoj, ankoraŭ la nigra robo kovradis ŝin.

— Fine! — ŝi kriegis, kaj triumfanta, ŝi lasis elgliti siajn robojn.

La pugno terurega de Josafat eniĝis en la nudecon de la trokuraĝa virino; per sia kolosa forto li ĵetis ŝin kontraŭ la unuajn ŝtupojn de la malluma helico; la kranio de Fineta frapis ĉe la malmola ŝtono, kaj akra ektremiĝo lasis ŝin rigida.

Josafat, atentema, amasigis la robojn varmetajn, odorajn, sur la hontigan karnon de Fineta; li riglis la pordon, kaj lasante ŝin enfermita en la mallumeco de la sonorileja ŝtuparo, rapide foriĝis de tiu maltrankviliga loko.

VIII.

Kaj ne venis la ombro alta kaj severa.

„Mi noktgardos pri vi; la peko, kiu malpurigas vian animon, estas el tiuj, kiuj kutimas pluvivi ĉe la homoj; via estaĵo estas saturita de malĉasteco kaj facile vi ree falus.“ Tiel parolis al li la konfesprenanto en la horo solena de la absolvo, tion memoradis Josafat, kaj tio kaŭzis lian perfortan agon.

Li iom post iom rekonsciiĝadis.

Kio okazis? Kion li estas farinta? Kio rezultos al li? Liaj okuloj esploradis la plej mallumajn angulojn de la granda navo. La instinkto konsilis al li fermi la tutan preĝejon. Silente, antaŭzorgema kaj malkonfida, li faris sian rondiron, rigardante kapelon post kapelo, ĝis li havis la konvinkon, ke la templo estas dezerta.

. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

Josafat baris ankaŭ la pordeton kaj ekiris vidi, kio estis okazinta ĉe la sonorileja ŝtuparo.

Dum la irado, li memoris esti ekvidinta la okuljon de la fivirino senespere turniĝantajn en la mallumo de la okulkavoj kvazaŭ adiaŭante sin de la vivo. Ia frosta fluo serpentiris tra liaj kruroj, malviglaj kaj tremaj; lia koro ŝajnis malfortiĝi kaj morti, kun rapidaj kaj etaj korbatoj, kaj la antaŭsento, ke lia trankvilo estas perdita por ĉiam, ekpremis lian spiriton.

Estis mallume kaj li bruligis la kandelon. Li malfermis. Fineta, en malĉasta sinteno, fiksadis sur lin ian rigardon malheligitan de miro kaj teruro; de ŝiaj morus-koloraj lipoj eliĝis io tre abomena, kio briladis ĉe la malkvieta palpebrumado de la eta kandelflamo; ŝia kapo

estis alpremata sub la rando de la tria ŝtupo, la mentono estis eniĝinta en la bruston, kaj la malordigitaj haroj algluiĝis al la brilanta frunto; ia grasa brileco, kiu pli vidigis la terure palan koloron.

Josafat, en tiuj momentoj, nostalgiis ĉiujn pasintajn feliĉojn de sia vivo, rememoris, unu post alia, ĉiujn favorojn ricevitajn, ĉiujn bonvolajn ridetojn, ĉiujn amikajn ekfrapojn.

Li volis tuŝi Fineta kaj ŝia nudeco timigis lin; ankoraŭ ŝi vekadis ĉe li malĉastajn ideojn.

— Ŝi devas esti malvarma, — li pensadis — malvarma kiel prujno. „Mi venis kun la internaĵoj brulantaj pro vi; eĉ mortinta, mi ankoraŭ vin dezirados."

. . . . . . . . . . . . . . . . . . .

# INTERNACIA MONDLITERATURO

La kolekto estas submetita al la gvidado de **Prof. D-ro Joh. Dietterle,** direktoro de la Esperanto-Instituto por la Germana Respubliko. Ĝi enhavas nur la plej famajn verkojn el ĉiuj naciaj literaturoj. Ĝis nun aperis:

Volumo 1:

**Goethe, J. W. von: Hermano kaj Doroteo.** Eposo idilia. El la germana originalo trad. *B. Küster.* 2a, korektita eldono. Kun antaŭparolo de *Prof. D-ro Joh. Dietterle.* 1922. 77 paĝoj. Kartonita.

Volumo 2:

**Niemojewski, A.: Legendoj.** El la pola originalo trad. *B. Kuhl.* Kun antaŭparolo de *Antoni Grabowski.* 2a, korektita eldono. 1923. 74 paĝoj. Kartonita.

Volumo 3:

**Turgenev, Ivan S.: Elektitaj noveloj.** El la rusa originalo trad. *A. Mexin.* 1923. 81 paĝoj. Kartonita.

Volumo 4:

**Raabe, Wilhelm: La nigra galero.** Historia rakonto. El la germana originalo trad. Prof. D-ro *Fritz Wicke.* 2a, korektita eldono. 1922. 64 paĝoj. Kartonita.

Volumo 5:

**Hildebrand: El la „Camera Obscura".** El la holanda originalo trad. *H. C. Mees.* 1923. 64 paĝoj. Kartonita.

Volumo 6:

**Irving, Washington: El la skizlibro.** El la angla originalo trad. *H. L. Elvin.* 1923. 64 paĝoj. Kartonita.

Volumo 7:

**Chamisso, A. de: La mirinda historio de Petro Schlemihl.** El la germana originalo trad. *Eug. Wüster.* 1922. 84 paĝoj. Kartonita.

Volumo 8:

**Stamatov, G. P.: Nuntempaj rakontoj.** El la bulgara originalo trad. *Iv. H. Krestanoff.* 1922. 80 paĝoj. Kartonita.

Volumo 9:

**Ŝalom-Aleĥem. Perec.: Hebreaj rakontoj.** El la hebreaj originaloj trad. *Is. Muĉnik.* 1923. 78 paĝoj. Kartonita.

Volumo 10:

**Puŝkin, A. S.: Tri noveloj.** El la rusa originalo trad. D-ro *A. Fiŝer.* 1923. 67 paĝoj. Kartonita.

**FERDINAND HIRT & SOHN EN LEIPZIG**

**ESPERANTO-FAKO**

# INTERNACIA MONDLITERATURO

Volumo 11—12:

**Ariŝima, T.: Deklaracio.** Romano. El la japana originalo trad. *T. Toogun.* 1924. 125 paĝoj. Kartonita.

Volumo 13:

**Poe, Edgar, Allen: Ses noveloj el „Rakontoj de mistero kaj imago".** El la angla originalo trad. *A. Frank Milward.* 1924. 80 paĝoj. Kartonita.

Volumo 14:

**Balzac, Honoré de: La firmao de la kato, kiu pilkludas.** El la franca originalo trad. *Paul Benoit.* 1924. 75 paĝoj. Kartonita.

Volumo 15:

**Doroŝeviĉ, Vlas: Orientaj fabeloj.** El la rusa originalo trad. *Nikolao Hohlov.* 1924. 64 paĝoj. Kartonita.

Volumo 16:

**Sienkiewicz, Henryk: Noveloj.** El la pola originalo trad. *Lidja Zamenhof.* 1925. 64 paĝoj. Kartonita.

Volumo 17:

**Strindberg, August: Insulo de feliĉuloj.** El la sveda originalo trad. *Oskar Frode.* 1926. 69 paĝoj. Kartonita.

Volumo 18:

**Bertrana, Prudenci: Barbaraj prozaĵoj.** El la kataluna originalo trad. *Jaume Grau Casas.* 1926. 59 paĝoj. Kartonita.

Volumo 19:

**Ŝimunoviĉ, Dinko: Ano de l'ringludo.** El la kroata originalo trad. *Fran Janjiĉ.* 1926. 86 paĝoj. Kartonita.

Volumo 20:

**Eekhoud, Georges: Servokapabla. Marcus Tybout.** El la flandra (franclingva) originalo trad. *Léon Bergiers.* 1926. 80 paĝoj. Kartonita.

Prezo po volumo: Rm. 1.60
Duobla volumo: Rm. 2.50
Kvin volumoj laŭ elekto: Rm. 6.—

La kolekto estas daŭrigata.

**FERDINAND HIRT & SOHN EN LEIPZIG**
**ESPERANTO-FAKO**

# ORIGINALA ESPERANTO-LITERATURO

## H. A. LUYKEN: Du Romanoj

**PRO IŜTAR.** Romano el la antikva Babela historio. 1924. 304. paĝoj. Bindita Rm 7.—

**Esperanto Triumfonta** (1924, No. 211): „... vereco de la historieca fono, majstreca karakterizado de la personoj kaj eleganteco kaj brileco de stilo kaj lingvo envicigas la romanon en la unuan rangon. Ĝi estas efektive unu el la plej bonaj kaj plej valoraj esperantaj original-romanoj, kiuj ĝis nun ekzistas...“

**Literatura Mondo** (1924, No. 12): „... Kore mi gratulas la verkiston, kies plej nova romano estas ne nur brila pruvo pri lia talento, sed samtempe la plej valora gemo en lia verkarjuvelo. La eleganta kaj facila stilo estas ĉefa allogilo de la libro, per kiu la verko donas tian valoraĵon al la leganto, kian li ne ricevas kutime en multaj verkoj, eĉ tro laŭditaj, de nia literaturo.“

**STRANGA HEREDAĴO.** Romano originale verkita. 1922. 320 paĝoj. Broŝurita Rm 5.50, Bindita Rm 7.—

**Esperanto** (1922, No. 12): „... Sed neeble resumi tiun lerte aranĝitan historion. Komencinte legi ĝin, oni iras ĝis la fino, scivola pri la strangaj aventuroj, aŭ pri la sorto de l' personoj, aŭ pri la ama intrigo, kaj ne forlasas la libron antaŭ la lasta paĝo. Tio jam estas kvalito ĉe romano. Plie ĉi tiu estas verkita per flua, korekta stilo. Ĉiu samideano ne ankoraŭ leginte la novan originalan romanon de S-ro Luyken do povas havigi al si kelkajn horojn da honesta distraĵo kaj ĝudona legado.“

**La Espero** (1922, No. 10): „... Mi legis preskaŭ tutajn noktojn kaj ne povis ĉesi antaŭ la fino.“

---

## JEAN FORGE: Du Romanoj

**ABISMOJ.** Romano originale verkita. 1923. 150 paĝoj. Broŝurita Rm 3.—, Bindita Rm 4.50

**Belga Esperantisto** (1923. No. 9/10): „... Kaj lia libro certe havos honorlokon en la biblioteko de ĉiu bona Esperantisto.“

**Esperanto** (1923, No. 10): „... Ĉio en la libro estas laŭdinda kaj „Abismoj“ estas valora riĉigo de nia originala romanaro.“

**SALTEGO TRANS JARMILOJ.** Romano originale verkita. 1924. 192 paĝoj. Bindita Rm 5.—

**Literatura Mondo** (1924, No. 12): „... Plastika kaj vigla stilo, facila komprenebleco, luda legebleco, jen la plej fortaj flankoj de la verko. La aŭtoro akiris por si lingvaĵojn, kiu vaksmole konformiĝas al liaj pensoj, kiu estas frapante viva kaj sugestie impresa — ĝuste per sia simpleco kaj facileco.“

FERDINAND HIRT & SOHN, ESPERANTO-FAKO, LEIPZIG

## PAUL BENNEMANN:

Internacia legolibro

# TRA LA MONDO

**Ia parto: Por komencantoj.** Kun multaj bildoj kaj muzik-notoj. 1924. 5a eldono. 96 paĝoj. Kartonita. 1.50 Rm.

„... Jen vere utilega libro por la kursestroj kaj iliaj lernantoj. Bele presita sur bona papero kaj kun multaj delikataj bildoj kaj bildetoj, la libro estas vera trezorejo da bonaĵoj por la lernanto kaj certe allogas lin al la plua esploro de nia jam ampleksa literaturo." *British Esperantist.*

**IIa parto: Por progresintoj.** Kun aldono de 4 kompon-aĵoj. 1922. 144 paĝoj. Kun 12paĝa muzika aldono. Kartonita. 2.20 Rm.

„... Ni devas admiri, ke tia ampleksa verko kiel ‚Tra la Mondo' estas tiom zorge preparita; multon ni ŝuldas al la klopodado de s-ro Bennemann; en ĉiu serioza Esperantista librokolekto ‚Tra la Mondo' trovos indan lokon flanke de la ‚Fundamenta Krestomatio'. Ambaŭ havas apartajn kvalitojn, sed la novenaskita meritas apudesti sian neanstataŭeblan antaŭulon." *Esperanto.*

---

# INTERNACIA KANTARO

Kolekto de 64 popolaj kantoj el 26 nacioj. Kun aldono de 3 famaj koncertarioj (Händel-Mozart-Wagner). **Tekstaro.** 1922. (Formato: 11×15 cm.) 64 paĝoj. Broŝurita eldono —.60 Rm.

**Muzika eldono.** Aranĝita de Josef Achtélik, iama orkestr-estro ĉe la opero en Leipzig. 1922. (Formato: 19×13 cm.) 80 paĝoj. Broŝurita eldono 2.— Rm.; bindita eldono 3.— Rm.

„... El la ĝis nun aperintaj Esperantaj kantaroj la nuna superas ĉiujn aliajn per sia riĉeco, belaspekto, internacieco. Povu rapida disvastiĝo de tiu tre valora kaj rekomendinda verko revigligi la kantemon en niaj societoj kaj kunvenoj, kaj ankaŭ rekompenci la laŭdindan laboron de l'aŭtoro."

*Esperanto.*

**FERDINAND HIRT & SOHN EN LEIPZIG**

**ESPERANTO-FAKO**


BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA KUL

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA
KUL
Esperanto
1381 I.